

Usona **Esperantisto**

Bulteno de Esperanto-USA - N^o 2025:1



Reĝo de muzikiloj

Kovrilo-fotoj de John Bishop Organ Clearing House

How Your Donations are Used

Both **Esperanto-USA** and the **Esperantic Studies Foundation** need and appreciate your donations. Which organization should you donate to? The short answer is “*you should donate to both,*” because each organization has its specific purposes.



Esperanto-USA (incorporated as The Esperanto League for North America) is a membership organization whose bylaws define its purposes as follows.

The Esperanto League for North America, Inc. is constituted as a not-for-profit educational organization, whose primary purpose is to further education in, and dissemination of information about, the international auxiliary language Esperanto within the United States of America.

Although dues increased for 2025, after many years of no increase, dues alone are not adequate for E-USA's mission of dissemination and education. There is also the need and desire to provide programs for members like:

- The Annual Conference
- American Good Film Festival
- Scholarships to the Summer Esperanto Workshop called NASK
- Financial Support of Local and Regional Events
- Activities like the Bookmark Design Contest



The Esperantic Studies Foundation is a private foundation who has funded many of the tools, resources and websites that the Esperanto community uses. Some of these resources that you may have used are:

- Lenu.net
- Edukado.net
- Tekstaro.com
- Amikumu
- Lingvohelpilo
- UEA.facila

Although the Foundation is not an Esperanto organization, it works closely with Esperanto-USA and currently matches donations made to Esperanto-USA.

The Foundation has as a priority to conserve our Esperanto heritage by providing a home of books and valuable documents, so they are not discarded, by organizing their placement in the Firestone Library at Princeton or the W. E. B. Du Bois Library at UMass or somewhere else as appropriate.

As you can see, the work of both organizations deserves your financial support and we ask you to consider donating what you can, when you can with monthly sustain donations or an annual gift.



**Donate
Now!**



Amanda Schmidt, Executive Director of Esperanto-USA
Chuck Mays, Executive Director of the Esperantic Studies Foundation

Anoncoj	p.4
KER-ekzamenoj en 2025; Konto Espero; NOREK 2025; Dulanda Kongreso / Binational Conference & NASK; MeKaRo 2025; Malkovru Berlinon: ABELO, Ludo; Virtuala Antaŭkongreso 2025	
Kiam niaj valoroj estas politikigitaj	p.7
de la prezidanto • Brandon SOWERS	
La prezidanto malfermas la jaron kun mesaĝo pri nia rilato, aŭ senrilato, al politikoj.	
Verbo	p.8
senintenco esperantaĵo • Simono KEITH	
Verbo ne fiksiĝu.	
Dec-Feb Board Activity	p.9
de la estraro	
Summary of board meeting minutes for December 2024 through February 2025.	
2024 K4 Financa ĝisdatigo	p.10
de la kasisto • Matt BROOKS	
Jarfina raporto de nia kasisto pri la financa stato de E-USA.	
Malkovru la lingvon de financoj en Esperanto	p.11
de la kasisto • Matt BROOKS	
Oportuna terminaro por deĉifri la kompleksan financon lingvaĵon.	
La orgeno - reĝo de muzikiloj	p.12
muziko • Timothy BORONCZYK	
Ĝi estas pli ol nur instrumento.	
Tempo de la mortkristanoj	p.15
beletre • Jurij ŜĈERBAK, Viktor PAJUK	
La jaro estas 2077. La prezidento de la Konfederacio de Nordamerikaj Ŝtatoj adresas sian popolon kadre de atako kontraŭ Ukrainujo.	
La vivo de Peĉjo	p.16
ŝercoj • Timothy BORONCZYK	
La tridek-kvina en serio de Timothy BORONCZYK.	
Historio de Eduardo Vivancos	p.17
omaĝe • Xavier ALCALDE	
Esploru la mirindan vivon de ĉi tiu hispan-kanada dumviva esperantisto.	
Letero al la nevo	p.20
rakonte • Lua HALL	
Kuraĝigo de la onklo al Tokipono.	
Joruba teksado	p.21
kulturo • Wale OGUNYALE, Chelsea MOSES, Alena ADLER	
Por konservi indiĝenan metion.	
Konsiloj por vojaĝemuloj	p.23
de la redakcio • Alena ADLER	
Dum ĉio ŝanĝiĝadas, necesas informiĝi. <i>Lernado havas maldolĉan radikon, sed bonan efikon.</i>	
E-USA BALOTILO/BALLOT 2025	p.25
de la centra oficejo	
[EO] Jen kompleta informo pri la balotado de E-USA en 2025. Kandidatas unu por sekretario, kaj kvar por estrarano (vi rajtas elekti du). Krome, estas proponita ŝanĝo al la statuto.	
[EN] This is the complete information for E-USA's elections in 2025. There is one candidate for Secretary and four for Board Member (you may choose two). Also, there is a proposed change to the bylaws.	

Anoncoj

KER-ekzamenoj en 2025

La unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) estas unu el la plej gravaj servoj de UEA, realigataj de sia KER-Ekzamena Centro (KER-EC), kunlabore kun la retejo Edukado.net kaj la Akademio de Esperanto. Ili ekzistas en la niveloj B1, B2, C1 kaj C2 kaj eblas ilin trapasi surloke, en specifaj okazoj, aŭ rete, laŭ antaŭe decidita kalendaro. Por la jaro 2025 estas jam du aprobitaj ekzamensesioj, en kiuj eblos ekzameniĝi kaj ĉeeste kaj rete. Krom ili unu plia ankoraŭ dependas de la interesiĝontoj.

Toronto - 11-a de Julio

La unua ekzamendato estas la 11-a de Julio, komence de la Dulanda Kongreso en Toronto (Kanado) kaj fine de la ĵus antaŭa Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK). Paralele kun la ĉeestaj ekzamenoj eblos solvi ankaŭ rete la testojn kaj tiel tra la tuta amerika kontinento kaj en la proksimaj tempozonoj oni povos labori en komforta, dumtaga temp-intervalo. En tiu tago okazos ekzamenoj je niveloj: B1, B2 kaj C1.

UK, Brno - 1-a de Aŭgusto

La dua ekzamensesio okazos dum UK 2025, la 1-an de Aŭgusto. Ankaŭ en tiu tago okazos kaj ĉeestaj kaj retaj ekzamenoj, sed nur en tiuj niveloj, en kiuj aliĝos ĉeeste kaj rete sume minimume 12 kandidatoj. La proponataj niveloj estas B1, B2, C1 kaj C2. Pro la tempozono tiuj ekzamenoj taŭgos precipe por eŭropaj kaj aziaj kandidatoj.

IJK, Indonezio - 14-a de Aŭgusto (provizora)

Krom la du sesioj jam konfirmitaj, estas ankaŭ planata papera C1-ekzameno por homoj, kiuj partoprenos la 81-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Indonezio. Interesiĝantoj nepre skribu al ijk2025@tejo.org ĝis la 1-a de Majo, ĉar necesas minimume 10 kandidatoj por ke la ekzameno povu okazi.

Intervjuoj

La parolaj ekzamenoj havas du partojn: aŭdkomprenajn testojn kaj parolajn antaŭkomisionajn ekzamenojn. El tiuj por la antaŭkomisionaj, individuaj ekzamenoj estos fiksitaj pluraj ebloj, kaj la kandidatoj povos rezervi por si tempon: (a) por ĉeesta ekzameniĝo en Greziljono, en Toronto aŭ

iam dum la UK-semajno, aŭ (b) por retaj intervjuoj en ajna alia, antaŭe anoncita ekzamentago inter Junio kaj fino de Aŭgusto. La kandidatoj, kiuj ekzameniĝos rete, devos trapasi ankaŭ la parolan intervjuon rete, la kandidatoj de la ĉeestaj ekzamenoj povos elekti el inter ĉeestaj aŭ retaj ebloj.

Aliĝ-limdatoj

Al la ekzamenoj necesas aliĝi pere de la formularo¹ ĉe edukado.net. La limdato por aliĝi kaj pagi la kotizojn estas ĉirkaŭ je ses semajnoj antaŭ la ekzamentago (1-a de Junio por Toronto, kaj 15-a de Junio por UK). Ekde la 15-a de Marto ŝanĝiĝis la ekzamenkotizoj.

Provtestoj - prepariĝo

Por tiuj, kiuj ne scias decidi je kiu nivelo ili estas, ni disponigas senpagajn provtestojn,² kiujn oni solvu rete. Post la solvado de la testoj kunlaborantoj de edukado.net konsilas la solvintojn kaj vidigos ankaŭ la korektitajn testojn (kun la eraroj). En la prepariĝo kaj decido pri la nivelo povas helpi ankaŭ la geonkloj de la programo *Ekparolu!*. Tiuj, kiuj aliĝis al iu ekzameno sed bezonas ŝanĝi la nivelon laŭ la rezultoj de la preparkursoj aŭ de la provekzamenoj, povos tion fari, kontaktante la gvidanton de la ekzamena centro.

Por trovi pli detalajn informojn vizitu la retpaĝaron pri la KER-ekzamenoj³ aŭ skribu al la organizantoj per ker-ekzamenoj@edukado.net. Aliĝu kiel eble plej rapide kaj poste preparu vin diligente.

-
1. edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj
 2. <https://mallonge.net/UE-2025-1-provtestoj>
 3. <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Konto Espero: por helpi ...

... al esperantistaj viktimoj de milito kaj naturaj katastrofoj.

Konto Espero estas donackonto starigita de Universala Esperanto-Asocio dum la milito en eksa Jugoslavujo, kun la celo helpi esperantistojn suferantajn pro miltoj. Post tiam, oni etendis ĝin tiel, ke per ĝi oni povos helpi ankaŭ esperantistajn viktimojn de naturaj katastrofoj, ekzemple post la terura tertremo en Nepalo en 2015.

Eblas donaci al la konto ĉe la jena paĝo:

uea.org/alighoj/donacoj/espero

NOREK 2025

Datoj: de la 22-a ĝis la 24-a de Aŭgusto 2025

Loko: Portlando, Oregono, Usono

Dum pli ol 40 jaroj, la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK) kunigas esperantistojn de la tuta usona pacifika nordokcidento kaj okcidenta Kanado. Unuafoje, ĝi okazos en Portlando, Oregono en 2025. Ĉu vi kunvenos kun ni por semajnfino plena de Esperanto kaj amuzo?

Registriĝoj nun estas akceptataj. Pli da informoj ĉe esperantopdx.org/eo/norek-2025.

Dates: August 22–24, 2025

Location: Portland, Oregon, USA

For over 40 years, the Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (Northwest Regional Esperanto Conference: NOREK) has been bringing together Esperantists from around the US Pacific Northwest and Western Canada. For the first time, it will be held in Portland, Oregon in 2025. Won't you join us for a weekend of fun and engagement with other Esperantists from around the region?

Registration is now open. More information at esperantopdx.org/norek-2025.

Dulanda Kongreso / Binational Conference & NASK

Rilate la kongreson, baldaŭ aperos ĉe nia retejo listo de aliĝintoj, ĝis nun pli ol 50 homoj. Spite al la politika ĥaoso inter niaj landoj, ni kunfestu la amikecon inter esperantistoj el Kanado kaj Usono. Kaj dum vi estas en Toronto, kial ne progresigi vian Esperanto-nivelon ĉe nia elstara Nord-Amerika Somera Kursaro, kaj lerni de mondkonataj esperantistoj? Ne estas pli bona maniero progresigi vian Esperanton — trempu vin dum tuta semajno en Esperantujon! Jam fine de la semajno viaj pensoj kaj eĉ sonĝoj estos en nia lingvo. Ne maltrafu la okazon! <https://www.toronto2025.net/>

The conference already has more than 50 participants signed up; check the list on our website. Let's defy the political chaos between our countries by celebrating the friendship between Esperanto speakers in the U.S. & Canada. And while in Toronto, why not improve your Esperanto at our outstanding North American Summer Esperanto Institute ('NASK'), taught by world-famous Esperantists? There is no better way to improve your Esperanto — immerse yourself in it for an entire week! By week's end you'll be thinking & even dreaming in it. Don't miss out! <https://www.toronto2025.net/>

MeKaRo 2025

Otavaj Esperantistoj invitas vin al MeKaRo 2025, en la ĉefurbo de Kanado, de la 17-a ĝis la 19-a de Majo.

Tio okazos dum la Tulipfestivalo kiam la urbo estas plena da florgardenoj, kiam piediri estas la plej ŝatata okupo.

Programo:

Sabato, 17 Majo

Akcepto 11h00-14h00. Restoracio Working Title, 330 Laurier Avenuo Orienta

Posttagmeze: Vizito al la Eksperimenta Farmbieno

18:00: Vespermanĝo kaj distra vespero ĉe la Matte-Haltrecht.

Dimanĉo, 18 Majo

Vizito ĉe la Sinagogo Templo Israel.

Posttagmeze: Vizito de la tulipĝardenoj piede

Plia programo decidota depende de la nombro de partoprenantoj.

Bonvolu anonci vin plej frue kiel eble al la adreso:

guymatte450@gmail.com

Informo el esperanto.ca/2025/02/22/mekaro-2025/

Malkovru Berlinon: Unika maniero ludi tabulludojn kaj videoludojn

Ludkalendaro:

- 29 Aŭg – 1 Sep: ABELO (tabulludoj, en berlina naturamika domo, en Esperanto)
- 5–8 Sep: Ludo (videoludoj, en la Esperanto-Stacio, en Esperanto)
- 12–15 Sep: Ludo (videoludoj, en la Esperanto-Stacio, en la angla)

Se vi estas aventurema ludemulo, jen perfekta ŝanco por vi! Planu vojaĝon al Eŭropo kaj ĝuu nekredeblajn eventojn en la regiono de Berlino, kie ludoj kaj amikeco kuniĝas.

Unue, partoprenu en ABELO, semajnfina renkontiĝo en bela naturamika domo en Berlino. Vi havos ŝancon ludi tabulludojn, babili kun aliaj ludemuloj, promeni tra natura ĉirkaŭaĵo kaj eble eĉ naĝi! La etoso estas amuza, malgranda, kaj memzorga. Jessica Grasso estas usonano dediĉita al ludoj kaj Esperanto, kiu jam organizas la eventon ekde 2016.

Post mallonga paŭzo, preparu vin por Ludo, mirinda semajnfina videoluda evento en la unika Esperanto-Stacio en Halbe, iom ekster Berlino. De retroaj konzoloj kiel Pong kaj Nintendo GameCube ĝis modernaj teknologioj kiel VR per Meta Quest 3, ĉi tiu evento promesas neforgeseblan sperton. Aparte amuza estas la dancmatoj, kiuj similas al Dance Dance Revolution. Krome eblas ludi modernajn ludojn kune sur 100-cola ekrano. Chuck Smith, usona esperantisto, kaj fama nederlanda jutubisto Irizanto organizas la eventon jam ekde 2021.

La plej bona parto? Vi povas resti ĉe la Esperanto-Stacio kontraŭ nur po 30 eŭroj nokte inter la eventoj. Estas rekta 40-minuta trajno al la Esperanto-Stacio de Berlino. Tiel facilas vojaĝi inter eventoj kaj esplori Berlinon kaj ĉirkaŭaĵojn senpene. Esploru la regionon, vizitu historiajn vidindaĵojn, kaj poste plu ludu!

Ne nur estas okazo por ludi, sed ankaŭ unika maniero esplori kulturon, amuziĝi, kaj krei belajn memorojn. Aliĝu al la ludemuloj kaj partoprenu en ĉi tiu speciala eventaro!

Hejmpaĝo de ABELO:

<abeloabeloabelo.wordpress.com>


Hejmpaĝo de Ludo:

<<https://ludo.events/eo>>



Virtuala Antaŭkongreso 2025

ViA revenas ĉi-jare! Atendu pliajn informojn (retpoŝte) pri la dua Virtuala Antaŭkongreso, okazonta la 3-an de Majo. Same kiel la antaŭan jaron, ĝi estos oportuno engaĝiĝi kun la diversaj fakoj kaj funkciuloj de Esperanto-USA antaŭ la jara kongreso — pri kiu vi povos ankaŭ informiĝi!



Kiam niaj valoroj estas politikigitaj

de la prezidanto • Brandon SOWERS

Karaj samideanoj,

Kiam mi preparis verki por la nuna numero de *Usona Esperantisto*, mi sciis, ke mi devos trakti la lastatempajn okazaĵojn, fontantajn el la agado de politikistoj, kiujn ni ne povas ignori, ĉar ili tuŝas nin, nian labormanieron, kaj niajn membrojn. Estas aferoj, kiujn ni delonge faradas, kiuj antaŭ ses monatoj apenaŭ implicis politikan starpunkton, kiuj nun, inverse, levas fortajn politikajn implicojn.¹

Jen tre konkreta ekzemplo: Pasintjare ni proponis al la Kanada Esperanto-Asocio okazigi komunan kongreson en Toronto, kaj ni proponis al ESF samloke okazigi NASK tuj antaŭ la kongreso. Komuna projekto inter usonanoj kaj kanadanoj estis apenaŭ politika tiam,² kaj post du jarcentoj da paca landlimo: Kiu povintus imagi, ke la situacio tiom ŝanĝiĝus ene de nur kelkaj monatoj?

Krom la kreskanta tensio inter Usono kaj Kanado, estas la deklaro, ke la angla estos la oficiala lingvo de Usono; estas atakoj kontraŭ neprofitcelaj organizoj, aparte tiuj, kiuj defendas inkluzivon kaj diversecon; estas fortaj atakoj kontraŭ kelkaj specifaj grupoj (aparte transgenruloj kaj enmigrintoj); estas atakoj kontraŭ la Unuiĝintaj Nacioj; kaj sendube estas aliaj, kiujn mi forgesis listigi, aŭ kiuj estos okazintaj inter la tajpado kaj presado de ĉi-artikolo. Kiel neprofitcela organizo, kiel organizo, kiu proponas internacian lingvon por estigi amikajn rilatojn inter la popoloj de la mondo, kiu celas speguli kaj reprezenti la diversecon de Usono al la internacia Esperanto-movado; kiel organizo, kiu fieras pri la partopreno de transgenruloj kaj enmigrintoj; kiel organizo, kiu aktive engaĝiĝas pri la reprezentado kaj antaŭenigo de Esperanto ĉe la Unuiĝintaj Nacioj — ĉiuj tiuj politikaj novaĵoj forte efikas sur nin.

Kompreneble, estas multaj duboj pri *ekzakte* kiel ĉio tio rilatas al ni, pri kiel ni rilatas al ĝi, aŭ pli precize, pri ekzakte kiel ni reagu al ĝi — se ni eĉ reagu entute. Unue ni devas konstati, ke nia statuto deklaras nin porĉiame neŭtrala rilate politikon (inter aliaj aferoj); kaj due ni devas agnoski, ke kiel esperantistoj, kiel reprezentantoj de la interna ideo, ni antaŭenigas homaranecajn valorojn. Ni

ne simple prezentas Esperanton al la mondo sole nur kiel lingvon, sed kiel unuigilon de plej diversaj homgrupoj ĉirkaŭ la mondo (inkluzive ene de Usono mem).

Estas membroj, kiuj volas, ke ni emfazu nian politikan neŭtralecon kaj restu fidelaj al ĝi. Ili rajtas je tiu starpunkto, kaj ne malpravas. Estas membroj, kiuj volas, ke ni fieru pri niaj valoroj, ke ni ne cedu ilin antaŭ la lavango da atakoj, kiuj nun okazas. Ankaŭ ili rajtas je tiu starpunkto, kaj ne malpravas. Estas tria perspektivo, de tiuj, kiuj timas, kio povos okazi, se ni levus nian kapon tro alte, kaj ankaŭ tio estas tre komprenebla timo.

Rilate al tiu lasta, la timo pri kio povos okazi — mi povas diri, ke la estraro jam komencis konsideri, kiel ni plej bone protektu la asocion sen forcedi niajn principojn, kaj tiu diskuto daŭros. Konkrete, multaj el la ‘ekzekutivaj ordonoj’, kiuj promulgiĝis dum la lastaj semajnoj kaj kiuj minacas neprofitcelajn organizojn, minacas specife la financan subtenon, kiun tiuj organizoj ricevas de la registaro. Ni memoru: *Ni ne ricevas financojn de la registaro, nek de grandaj firmaoj ligitaj al ĝi.* Dank’ al la subteno de niaj membroj, ni estas en financa situacio tre sendependa, kaj neniu povas diri al ni, kion fari, krom niaj membroj. Efektive, pro la novaj kotizoj, kiujn la membroj aprobis pasintjare, kaj pro la kreskanta nombro de membroj, kiun ni entuziasme konstatis dum la lastaj du jaroj, ni estas nun en ne malbona financa situacio.

Mi pensas, ke tiuj tri supre listigitaj pozicioj ĉeestas ĝis certa grado en preskaŭ ĉiu esperantisto en Usono nuntempe, eĉ por tiuj, kiuj plej forte defendas unu el ili. Do, mi petas, ke ni ĉiuj estu paciencaj unu kun la aliaj en la nuntempa, malfacila momento. Verŝajne devos okazi debatoj kaj diskutoj pri ĉio ĉi, kaj mi esperas, ke tio povos okazi en spirito subtenema kaj komprenema, tiel ke diskutoj ne iĝu disputoj.

Ŝajnas, ke estas kontraŭdiro inter la unuaj du starpunktoj, kiujn mi supre listigis, sed mi forte kredas, ke la ŝajna kontraŭdiro inter tiuj vidpunktoj estas ekzakte tio — ŝajna. Mi kredas, ke niaj homaranecaj valoroj ne estas politikaj, kaj ne devus esti konsiderataj kiel legitimaj temoj por politika debato, eĉ kiam politikistoj provas ilin politikigi.

1. Kvankam, efektive, nenio estas komplete senpolitika. Sed estas aferoj, kies politikaj implicoj estas pli polemikaj ol aliaj.
2. Denove mi diras ‘apenaŭ’, ĉar la paca rilato inter Usono kaj Kanado estas en si mem politika. Por kompari, oni nur devas imagi eventualan komunan kongreson inter usonaj kaj kubaj esperantistoj — tio en si mem evidente levus politikajn implicojn.
3. Laŭ mia kompreno, UEA deklaris sin por universalaj homaj rajtoj kelkajn monatojn antaŭ la Universala Deklaro de Homaj Rajtoj en Decembro de 1948.

Kiam Esperanto-USA fondiĝis kiel la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko en 1953 kaj deklaris sin porĉiame politike neŭtrala, *jam tiam* ni defendis homaranecajn valorojn, kaj ni ne vidis kontraŭdirojn inter tiuj du starpunktoj. Ni tuj, ekde nia fondiĝo, celis aliĝi al la Universala Esperanto-Asocio, kiu refondiĝis en 1948 kaj bazis sin sur la koncepto de universalaj homaj rajtoj, kaj sur la internacia kunlaboro, kiun reprezentis la Unuiĝintaj Nacioj.³ Ni krome memoru, ke en la sama antaŭparolo al nia statuto, kie ni deklaras nin politike neŭtralaj, ni ankaŭ deklaras la valoron de Esperanto por efektiviĝi amikajn rilatojn inter la diversaj popoloj de la mondo. Ni faris tion, eĉ malgraŭ la provoj ‘politikigi’ la konceptojn de universalaj homaj rajtoj aŭ la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj ekzistis en la 40-aj kaj 50-aj jaroj (kaj tiuj atakoj estis veraj, eĉ se ili ŝajnis fakte ridindaj ĝis la nuna momento). Efektive, en tiuj jaroj, parto de la motivigo por fondi ELNA estis la atakoj, kiujn Joseph CONNOR (la prezidanto de la antaŭa organizo, EANA) ĵetis kontraŭ UEA, asertante, ke ĝia insisto pri universalaj homaj rajtoj kaj pri subteno por la Unuiĝintaj Nacioj, estis pruvo de komunisma komploto kaj akaparo de UEA. ELNA estis fondita de ribeluloj, kiuj volis havi asocion en Usono, kiu kunlaborus kun la

internacia movado malgraŭ la politika klimato de McCarthy-ismo tiam reganta ĉi-lande. Do: pri politiko, neŭtrala; sed pri homaj rajtoj kaj homaranecaj valoroj, ne. Tiel ni estis tiam, kaj mi kredas, ke tiel ni restos.

Kompreneble, tio ne estas kaj ne devas esti la lasta vorto pri la temo. Mi kuraĝigas ĉiujn, kiuj havas vidpunkton, verki pri la temo por *Usona Esperantisto*. Dume, la estraro taskigis laborgrupon por prepari deklaron pri niaj valoroj, pri kio ni dividos malneton kiam ĝi pretos, kun la celo peti reagojn kaj opiniojn antaŭ la Dulanda Kongreso en Toronto. Do, se estos diskutoj pri la temo en la paĝoj de la bulteno, tio helpos al ni kompreni la vidpunktojn, kiuj ekzistas en nia movado, por certigi, ke ni kiom eble plej bone sintezos ilin.

Ni memoru, ke Esperanto gravas, ĉar ĝi unike inter lingvoj povas krei kondiĉojn kiuj permesas renkontiĝi “*ne angloj kun francoj, ne rusoj kun poloj, (nek usonanoj kun kanadanoj) sed homoj kun homoj*”, kaj tio estas granda parto de nia kialaro por prezenti ĝin al la mondo.

Mi esperas, ke baldaŭ ni alvenos al situacio, en kiu la celo ligi homojn kun homoj ne plu estos konsiderata politika.

Verbo

senintenca esperantaĵo • Simono KEITH



Kion la verbo faris, kiam ĝi trovis sin en sakstrato?

Ĝi konsultis tezaŭron por trovi novan vojon. -AA

Dec-Feb Board Activity

de la estraro

To conserve space, the newsletter includes only the minutes summary. The full meeting minutes (including discussions) become available on E-USA's main website: esperanto-usa.org/en/category/meeting-minutes/

December 2024

Proposal: Add to the Financial Management Policy an Investment Management Addendum and a Reporting Details Addendum. Proposal passes unanimously.

Proposal: Approve the draft budget for 2025, to include both overhead income and expenses as well as program income and expenses. Proposal passes unanimously.

Proposal: Recommend that Amanda Higley Schmidt be made the Executive Director of the Central Office (no longer in a transitional capacity) and that the budget for labor for the position be increased from an average of 20 hours per week to 25-30 hours per week. The Executive Committee will work with Amanda to craft an updated position description for the Permanent Director of the Central Office/Executive Director position by the end of January 2025. Proposal passes unanimously.

January 2025

Proposal: That the Executive Committee be empowered to work with Springly on implementation of this software for an updated Membership Directory. Proposal passes unanimously.

Proposal: Adopt the Special Committees policy for Esperanto-USA, to be implemented immediately. This policy will establish clear guidelines for the formation, responsibilities, and reporting of special committees, ensuring alignment with our strategic goals. All current special committees (International, Projects, Communications, Promotions, Bylaws, Membership, Executive, Educational, Prisoner Relations) shall transition to this policy by the close of the Annual Congress. The Vice President will assist with that process to ensure a smooth implementation. Proposal passes unanimously.

February 2025

Proposal: that the proposed Spending Limits Addendum be added to the Financial Management Policy. Proposal passes by acclamation.

Proposal: That the proposed changes be added to the financial management policy regarding financial planning and budgeting (section 4, 5th sub-bullet, and 6th sub-bullet in the annual budget section). Proposal passes by acclamation.

Proposal: that Esperanto-USA send a proposal for a change in UEA's bylaws, as follows. Proposal passes unanimously.

Current language:

"23. Komitatanoj A. Ĉiu aliĝinta landa asocio kun 100 ĝis 1000 membroj elektas unu komitatanon, kaj unu plian por ĉiu komencita milo, ĝis maksimume 6 komitatoj. La nombro de la komitatoj de ĉiu landa asocio ne malkreskas dum la oficperiodo, sed landa asocio, kiu aliĝas aŭ atingas pluan milon (ĝis atingi de la sesa milo) elektas komitatanon aŭ komitatojn por la resto de la periodo. Neniu landa asocio rajtas al pli ol 6 komitatoj entute."

Proposed language (changes in bold):

*"23. Komitatanoj A. Ĉiu aliĝinta landa asocio kun **almenaŭ 100 membroj elektas komitatano(j)n laŭ la suba tabelo:***

100-250 membroj: 1 komitatano
251-500 membroj: 2 komitatoj
501-1000 membroj: 3 komitatoj
1001-2000 membroj: 4 komitatoj
2001-3000 membroj: 5 komitatoj
Pli ol 3000 membroj: 6 komitatoj

*La nombro de la komitatoj de ĉiu landa asocio ne malkreskas dum la oficperiodo, sed landa asocio, kiu aliĝas aŭ atingas pluan milon (ĝis atingi de la **kvara** milo) elektas komitatanon aŭ komitatojn por la resto de la periodo. Neniu landa asocio rajtas al pli ol 6 komitatoj entute."*

Motivation to include with the proposed language:

Konstatante, ke la statuta paragrafo pri la konsistigo de la komitato (23) fontas el tempo, kiam pluraj landaj asocioj kalkulis je miloj de membroj, situacio kiu apenaŭ plu ekzistas, ni proponas ŝanĝi tiun paragrafon, tiel ke ĝi pli konformos kun la membrokvantoj, kiuj estas realismaj por la plejmulto de nuntempaj landaj asocioj. Ni antaŭvidas almenaŭ 5 bonajn rezultojn de tio:

La proponita ŝanĝo respektos la intencon de la originala lingvaĵo, laŭ kiu la komitato estis reprezenta organo, en kiu

asocioj havu proporcie pli aktivan rolon laŭ sia membrokvanto;

La proponita ŝanĝo malfermus la komitaton al novaj fortoj, sen devigi al la spertuloj demisii;

La proponita ŝanĝo kondukus al situacio, en kiu multaj landaj asocioj havus pli ol unu peranto inter si kaj UEA, kaj tiel la informfluo estos pli stabila kaj demokratia, por ambaŭflanka profito;

La proponita ŝanĝo, per la konsistigo de pli vaste reprezenta komitato, disponigos pli da kandidatoj por la estraro de UEA;

La proponita ŝanĝo motivigos al landaj asocioj akiri pli da membroj, kaj ne perdu tiujn, kiujn ili havas. Por asocio kun

ekzemple 200 aŭ eĉ 400 membroj, estas nerealisme eĉ strebi por mil; sed estas realisme strebi por 250 aŭ 500, kaj zorgi ne iri sub tiu limo.

Additional information - how UEA's bylaws are amended:

"59. Ŝanĝo de la Statuto. La Statuton povas ŝanĝi nur decido de la Komitato, en kunsido kunvokita kun la sciigo, ke en ĝi estos proponita ŝanĝo de la Statuto. Inter la tago de la kunvoko kaj la tago de la kunsido devas esti minimume 30 tagoj. Por decido pri statutŝanĝo necesas minimume la duono de la esprimataj voĉoj, en kunsido de la Komitato, en kiu ĉeestis minimume la duono de la komitatanoj aŭ iliaj anstataŭantoj."

2024 K4 Financa ĝisdatigo

de la kasisto • Matt BROOKS

Dum ni fermas la jaron 2024, ni ĝojas sciigi al vi la progreson, kiun ni faris, kaj niajn planojn por la estonteco. En kvaronjaro kvar (K4) de 2024, ni koncentriĝis pri fortigo de la financa bazo de la organizaĵo, poziciigante nin por transforma jaro 2025. Jen resumo de nia nuna stato:

Financaj elstaraj punktoj

Enspezoj:

En K4, ni ricevis 12 407 \$ de enspezoj, ĉefe de membrekotizoj, donacoj, kaj vendoj de nia librejo. Krome, 30 000 \$ estis transdonitaj el nia nelimigita investa konto al nia banka konto por certigi, ke niaj operaciaj rezervoj estas en ordo.

Elspezoj:

Ni elspezis 30 596 \$ dum la kvaronjaro pri premioj de la *Usona Bona Film-Festivalo*, stipendioj, kaj gravaj investoj en profesiajn servojn (ekzemple kontadon kaj impostopreparon) kaj salajrojn. Grava paŝo estis nia aliĝo al profesia kontada firmao, kiu helpis nin prepari kaj sendi precizajn financajn raportojn por ke ni povu ĝustatempe sendi nian neprofitcelan federacian impostan deklaron (Formularo 990¹) en la estonteco.

Neta efiko:

Dum K4 montris operacian deficiton de 18 190 \$, tio estis kompensita per 41 100 \$ da neefektivigita rento, rezultigante netan kreskon de 22 910 \$ en aktivoj. Ĉi tiuj gajnoj reflektas nian engaĝiĝon al respondeca administrado de membraj kaj donac-fondusoj.

Fondusoj kaj investoj

Unu el la plej gravaj mejloŝtonoj en ĉi tiu kvaronjaro estis la starigado de dediĉita Fondusa Konto. Ĉi tiu konto, nun apartigita de nelimigitaj investoj, ebligas al ni pli precize spuri fondusojn, kiuj estas donacit-celitaj. Je la 31-a de Decembro, la Fondusa Konto enhavas 277 708 \$. En la jaro 2025, ni planas uzi antaŭplanitan retiraĵon de 10% el fondusoj por subteni programajn elspezojn. Ekde 2026, ni planas adopti jaran retiraĵon de 4-5%, kio kongruas kun tutfakaj plej bonaj praktikoj.

Nia nelimigita investa konto staras je 314 208 \$ post transdono de 30 000 \$ por subteni niajn operaciajn rezervojn. Sed atentu: Ĉi tiuj aktivoj ankoraŭ estas destinitaj por uzado dum longa periodo. Sekve, ni aplikos ankaŭ antaŭplanitan, malgrandan retiraĵon ĉiujare por parte financi la operaciajn kostojn de la Centra Oficejo, inkluzive de la Librejo kaj **Usona Esperantisto (UE)**.

Rigardante antaŭen, ni ĝojas daŭre provizi kaj interretan version al **UE** kaj profesian, presitan version, uzante nian neprofitcelan rabaton por presado kaj sendado. Por doni iom da kunteksto, la presita versio, sendita al ĉiuj membroj, kostas 4000 \$ jare, kio estas 2+% de niaj sumaj elspezoj (kaj eĉ malpli kompare kun nia jara enspezo). La estraro diskutos opciojn por permesi al homoj elekti ne ricevi la paperan version per la nova membro-direktoro aŭ administra sistemo, kiun ni esploras, tamen, pro la tre malgranda efiko sur la buĝeto, ni sentas nin bone pri la valoro, kiun ĝi alportas al niaj membroj.

Dume, la **Reed Trust** (apartigita ento, kiun ni administras) tenas **405 741 \$**. Rimarku: Laŭ la jura dokumento kiu starigas la fonduson, ni respondecas direkti **90%** de ĝiaj kvaronjaraj enspezoj por subteni Esperanto-edukajn programojn, kaj konservi **10%** por kovri niajn kostojn en administrado de la fonduso. En

2025, ni planas dediĉi la tutan 90% al subteno de **NASK** (la Nord-Amerika Somera Kursaro), semajna enmergiĝa kurso, kiu okazos en Toronto ĝuste antaŭ la Dulanda Kongreso.

Rigardante antaŭen al 2025

Dank' al la laboro farita de la Centra Oficejo en 2024 por transdoni niajn financajn registrojn al *QuickBooks Online*, aliĝi al profesia kontada servo, aliĝi al profesia servo por prepari la organizon Formularon 990, ĝisdatigi kaj reorganizi la librejon, kaj efektiviĝi kvar esencajn financajn kaj konformeajn politikojn, ni eniras la jaron 2025 kun multe da vento en niaj veloj. Nun, post pluraj jaroj, ni ankaŭ kreis ampleksan buĝeton². Vi vidos pli pri tio baldaŭ! Niaj celoj por ĉi tiu jaro inkluzivas:

- Lanĉi monokolektan strategion por diversigi enspezofontojn kaj redukti nian dependecon je fondusoj.
- Plifortigi nian partnerecon kun la Esperantic Studies Foundation.
- Esplori subvenciajn eblecojn por certigi konstantan financadon por gravaj iniciatoj.

Ni certas, ke ĉi tiuj paŝoj ebligas al ni kreski kaj progresigi nian mision dum ni konservas la financon sanon de la organizaĵo.

Dankon pro via daŭra subteno kiel membroj kaj donacantoj. Kune, ni konstruas pli brilan estontecon por Esperanto-edukado kaj aktivado. Se vi havas demandojn aŭ volas pli da detaloj, ne hezitu kontakti min ĉe kasisto@esperanto-usa.org.

Ankaŭ, trovu pli oftajn artikolojn kaj ĝisdatigojn ĉe <https://www.esperanto-usa.org/finances!>

1. **Formularo 990** estas la deklaro postulata de la IRS, kiu priskribas la bazajn financajn agadojn de la neprofitcela organizo same kiel plurajn regularajn elementojn pri politikoj kaj administrado.
2. **Ampleksa buĝeto** reprezentas la enspezojn kaj la programajn kaj operaciajn kostojn de la neprofitcela organizo. Dum la lastaj kelkaj jaroj, E-USA preparis nur operacian buĝeton, dum granda parto de la programaj aŭ "fondusaj" elspezoj estis spurataj de la administrantoj de tiuj fondusoj.

Malkovru la lingvon de financoj en Esperanto

de la kasisto • Matt Brooks

Kvankam multaj homoj posedas fortan scipovon de Esperanto, financaj kaj negocaj terminoj restas malpli konataj inter eĉ spertaj parolantoj. Tamen, por ke Esperanto estu efika en ĉiuj aspektoj de la vivo, inkluzive de komerco kaj administrado, gravas koni bazajn fakvortojn de la financa mondo. Tio ankaŭ subtenas la celon de Esperanto-USA plialtgradigi sian staton en la universala movado, ebligante al niaj membroj pli efike komuniki pri financaj aferoj kaj partopreni internaciajn kunlaborojn.

Por helpi plivastigi vian vortprovizon, jen listo de 20 esencaj financaj terminoj kun iliaj anglaj ekvivalentoj:

1. **Bilanco** – Balance sheet
2. **Buĝeto** – Budget
3. **Deficito** – Deficit
4. **Deponaĵo** – Deposit
5. **Elspezoj** – Expenses
6. **Enspezoj** – Revenues/Income
7. **Fonduso** – Fund/Endowment
8. **Imposto** – Tax
9. **Investo** – Investment
10. **Kasfluo** – Cash flow (malofte, sed uzata)
11. **Kredito** – Credit
12. **Kurzorisko** – Exchange rate risk
13. **Monfluo** – Cash flow (pliofte uzata)
14. **Netaj aktivoj** – Net assets
15. **Obligacio** – Bond
16. **Profito** – Profit
17. **Rezervo** – Reserve
18. **Subvencio** – Grant/Subsidy
19. **Valorpapero** – Security (financial instrument)
20. **Ŝuldo** – Debt


Tiuj terminoj estas fundamentaj por kompreni financajn raportojn, krei buĝeton, aŭ diskuti pri investoj. Se vi neniam antaŭe renkontis iujn el ili, ne zorgu — ĉi tiu serio helpas vin kompreni kaj apliki ilin kun konfido.

Venontfoje, ni daŭrigos ĉi tiun serion per pli da vortoj kaj ekzemploj de kelkaj el ĉi tiuj terminoj, montrante kiel ili estas uzataj en realaj kunteksto. Restu kun ni dum ni esploras la faklingvon de financoj en Esperanto!

La orgeno - reĝo de muzikiloj

muziko • Timothy BORONCZYK

La orgeno estas nekompareble kompleksa kaj kapabla instrumento. Antaŭ la tempo de elektronikaj maŝinoj, la orgeno, konata kiel la “reĝo de muzikiloj”, reprezentis la pinton de homa eltrovemo, kaj estis detronigita nur en la 19-a jarcento, kiam aperis la telefoncentralo. Tamen, la orgeno restas unika en siaj majesto kaj kompleksa strukturo. En ĉi tiu artikolo mi prezentas la historion kaj funkcion de la orgeno, espereble por instigi pli profundan aprezon pri tiu impona muzikilo.



Gravuraĵo de "L'art du facteur d'orgues" (1766–78), kiu montras la funkcion de orgenoj. Tiam sen elektro, ludantoj bezonis asistanton por provizi la aerpremon.

Historio de la orgeno

La historio de la orgeno komenciĝas en antikva Grekujo kun la akvoorgeno. Inventita de Ktesibio el Aleksandrio, tiu instrumento uzis akvon por regi la aerpremon, kiu estis puŝita tra tuboj por krei sonon. La akvoorgeno rapide fariĝis populara en la publikaj spektakloj de Romio, disvastiĝante tra la imperio.

Dum la malkresko de la Okcidenta Romia Imperio, la orgeno daŭre evoluis en la Bizanca Imperio. La bizancanoj plibonigis la akvoorgenon, anstataŭigante la akvon per ledaj balgoj por pli bone regi la aerfluon. Tiu ŝanĝo en la dezajno de la instrumento iom post iom kondukis al la pli rekonebla formo de la orgeno. En la 8-a jarcento, la bizanca imperiestro Konstantino la 5-a enkondukis la orgenon en okcidentan Eŭropon, donacante tuban orgenon al Pipino la Pli Juna, Reĝo de la Frankoj.

La orgeno travivis gravajn ŝanĝojn kaj normigon dum la Renesanco. Dum tiu periodo, oni faris plibonigojn, kiel ŝvelkeston, kiu ebligis al ludistoj pli bone regi la laŭtecon, kaj piedan klavaron, kiu pliiĝis la gamon kaj muzikan

kapablon de la orgeno. Figuroj kiel Hans Ruckers kaj la familio Dallam ludis gravan rolon en la evoluo de orgeno dum tiu epoko.

Dum la baroka epoko, la rolo de la orgeno en muziko kaj socio signife plivastiĝis. La instrumento fariĝis fiksaĵo en katedraloj, kortegoj kaj koncertejoj pro sia kapablo imiti la sonojn de orkestro kaj ĥoro. Ĝi fundamentiĝis kaj en religiaj ceremonioj kaj sekularaj spektakloj, reprezentante prestiĝon kaj grandiozecon.

La populareco de la orgeno malpliĝis dum la 19-a jarcento ĉefe pro la apero de romantikismo, kiu valoris emocian esprimon kaj individuan esprimliberecon, favorante pli intimajn muzikilojn, kiel la pianon kaj violonon. Tiu ŝanĝo en muzikaj preferoj kaŭzis, ke la orgeno iom post iom perdis sian centran lokon en la muzika mondo, kvankam ĝi ankoraŭ rolis en religiaj ritoj.

Nuntempe, la orgeno denove akiris gravan lokon en la muzika mondo. Modernaj komponistoj, kiel Olivier Messiaen kaj Krzysztof Penderecki, verkas novstile kaj emociplene, kaj esploras la tembrojn kaj dinamikon de la orgeno. Interese, historiaj orgenoj ĉirkaŭ la mondo paralele ricevas atenteman prizorgon kaj restarigon, indikante novan intereson pri iliaj historiaj kaj kulturaj valoroj.



Orgeno konstruita en 1927 de usona firmao M. P. Molle. Ĝi estis tiam la plej granda orgeno en Florido, havanta 5 000 fajfilojn. La instrumento estis renovigita en 1990 de Wicks Organ Co. Foto kun permeso de Sacred Heart Church, Tampo, Florido.

Orgenkonstruo

La sonproduktado de la orgeno dependas de la regata movado de aero. En tradiciaj orgenoj, aerpremon liveras la balgoj, kiujn tretas asistantoj. Kontraste, en modernaj orgenoj, aero estas provizita per elektraj blovmajinoj. La

ĉefa distribuilo de aero al la organfajfiloj estas la ventkesto. Kiam orgenludanto premas klavon aŭ pedalon, malfermiĝas valvoj en la ventkesto, kaj aero fluas al la specifaj fajfiloj.

Fajfiloj estas faritaj por produkti specifan ton-alton kaj tembron. Tamen, ĉiu fajfilo povas sonigi nur unu tonon, do ampleksa vico da organfajfiloj estas bezonata por etendi la tutan tonamplekson de unu sonkoloro. Ĉi tia fajfilaro estas konata kiel registro. Per zorgema elekto de registroj, la orgenisto miksas sonojn el malsamaj serioj.

La komplekseco de la orgeno pliiĝas pro ĝiaj multnombraj klavaroj, interalie la pedala klavaro, kiuj havas siajn proprajn registrojn. La orgenludanto manipulas diversajn arojn de fajfiloj per ĉiu klavaro, kio ebligas la ludadon de kompleksaj, multtavolaj komponaĵoj. Lerte ludi la orgenon postulas eksterordinaran kapablecon, kun samtempa uzado de manoj kaj piedoj, kaj profunda kompreno pri muzika komponado kaj historio por bone elekti la diversajn registrojn kaj sonojn.

Ekzistas du ĉefaj manieroj, per kiuj tubo povas fari sonon. Lipfajfiloj funkcias laŭ la principo de direktado de aero trans akra rando por krei vibrojn, kaj anĉfajfiloj enhavas vibran lameton, kiu kreas sonon dum aero fluas super ĝi. La metodoj por sonproduktado kaj la uzitaj materialoj efikas la tembron de la tubo. Metalaj tuboj, kutime faritaj el alojoj de stano kaj plumbo, produktas helajn, klarajn sonojn. Lignaj tuboj produktas pli molan, pli varman tonon. La formo kaj longeco de la tubo determinas ties tonalton kaj tembron; pli longaj tuboj rezultigas pli malaltajn tonaltojn, kaj pli larĝaj tuboj kreas pli plenan sonon.

Ĝenerale, oni klasifikas organfajfilojn inter kvar kategorioj:

- [Principalaj](#)¹ - kutime faritaj el metalo, sonigas la fundamentan tembron de la orgeno.
- [Flutaj](#)² - faritaj el metalo aŭ ligno, sonigas mildajn tonojn, imitante la sonojn de lignaj blovinstrumentoj.
- [Kordaj](#)³ - mallarĝaj tuboj, kiuj sonigas delikatajn tonojn, imitante la sonojn de kordaj instrumentoj.
- [Anĉaj](#)⁴ - brilembraj fajfiloj, kiuj imitas la sonojn de trumpetoj kaj hobojoj.

Tra Eŭropo, la diversaj tradicioj en orgenkonstruado rezultigis distingeblajn stilojn kaj sonkarakterojn. Ekzemple, germanaj orgenoj estas rekoneblaj pro siaj fortaj principalaj tonoj, kaj francaj orgenoj ofte emfazas dolĉajn kaj esprimajn anĉfajfilojn. Ĉi tiu diverseco reflektiĝas ankaŭ en la nomoj de la fajfiloj; ĉiu regiono adoptis siajn proprajn terminojn. Ekzemple, oni nomas la saman fajfilon *Prestant* en la nederlanda, *Diapason* en la

angla, kaj *Prinzipal* en la germana. La retejo organstops.org prezentas grandan datumbazon por ĉi tiuj nomoj.

Multaj orgenoj prezentas belegan tubmontraĵon, kie la fajfiloj en la fasado estas zorge aranĝitaj. Tiuj ne estas nur dekoraciaj – ili estas plene funkciaj tuboj. La metaloj kaj finaĵoj estas elektitaj por kongrui bone kun la ĉirkaŭa arkitekturo. Artoplenaj tubmontraĵoj enkorpiĝas arkitekturajn elementojn kiel arkojn, kolonojn, ŝirmilojn, kaj skulptaĵojn, prezentante la arton kaj grandiozecon de la orgeno.



Granda orgeno konstruita en 1863 de germana firmao *E F Walcker Co*. Ĝi estis tiam la plej granda orgeno en Usono, havanta 6 088 fajfilojn. La instrumento estas en *Methuen Memorial Music Hall*, Bostono, Masaĉuseco. Foto kun permeso de Vikimedia Komunejo laŭ CC BY-SA 3.

Ĉiuj orgenoj estas ununuraj

Ĉiu orgeno estas unika instrumento, kies karakterizo formiĝas el la spaco, kiun ĝi okupas, kaj la financaj limigoj dum ĝia konstruado. En katedraloj, ofte troviĝas orgenoj kun potenca sono, kiuj kapablas plenigi la grandegan spacon, kutime per centoj aŭ eĉ miloj da fajfiloj. Male, en pli malgrandaj kaj intimaj lokoj troviĝas orgenoj kun pli

delikataj, nuancaj tonoj. Plie, ĉiu orgeno situas en kultura kaj historia kunteksto. De la klare resonaj barokaj orgenoj ĝis la stile diversaj usonaj orgenoj, la skolo de ĉiu instrumento reflektas unikan muzikan kaj kulturen tradicion.

Barokaj orgenoj estas famaj pro sia klareco, kun registraroj taŭgaj por la kontrapunkta muziko de tiu periodo. La principalaj registroj provizas helan fundamenton, kaj la flutaj registroj aldonas klaran difinon. Tiaj orgenoj kutime havas pli simplan pedalan klavaron, kun malpli da notoj kaj basaj sonoj, kaj ili malpli emfazas la miksadon de registroj inter la klavaroj. La komponaĵoj de majstroj kiel Bach kaj Dieterich Buxtehude ofte estas ludataj per tiaj orgenoj.

Hispanaj orgenoj kombinas renesancajn kaj maŭrajn influojn, kaj karakteriziĝas per siaj buntaj fasadoj. Ili uzas pli altan aerpremon kaj havas specialajn anĉfajfilojn, kiuj staras horizontale kaj produktas apartan, reĝecan sonon. La hispana organa tradicio floris dum la baroka epoko kun elstaraj komponistoj kiel Juan Cabanilles kaj Francisco Correa de Arauxo.

Francaj romantikaj orgenoj distingiĝas pro densaj orkestraj sonoj. Ili havas riĉan, simfonian sonkarakteron, kaj fokusiĝas sur esprimplenaj anĉaj registroj, inkluzive de la *Klarineto* kaj *Bombardo*. Pliaj karakterizaj registroj estas la *Voix Celeste* kaj *Unda Maris*, kiuj faras sonĝecan sonon por aldoni varmecon kaj teksturon. La tradicio de francaj romantikaj orgenoj estis influita de komponistoj kiel César Franck kaj Charles-Marie Widor.

Usonaj orgenoj enkorpiĝas miksaĵon de tutmondaj influoj, adaptitaj al la diversaj lokoj kaj stiloj troveblaj en Usono. Tiuj varias inter orkestraj orgenoj dezajnitaj por grandaj sekularaj ejoj kaj malgrandaj preĝejaj muzikiloj. Elstara influo en la usona skolo estis Ernest Skinner, kiu faris principalajn tubojn pli larĝajn por emfazi la fundamentajn frekvencojn. Oni eĉ nomas la rezultan sonon la “sono de Skinner” (angle: *Skinner sound*).

Nuntempe, virtualaj orgenoj malfermas novajn horizontojn en la kampo de organaj muziko kaj konstruo. Programoj kiel Hauptwerk kaj GrandOrgue utiligas ciferecajn samplajn de realaj organfajfiloj, provizante realisman aŭskultsperton sen la spacaj kaj financaj limigoj de fizikaj orgenoj. Ĉi tiuj virtualaj instrumentoj proponas grandan flekseblecon, ebligante al organistoj aŭtentike reprodukti diversajn organstilojn per unuopaj ludkonzoloj.



Ludkonzolo de orgeno konstruita de *M P Molle*, havanta 35 registrojn. La instrumento estas en *Ascension Lutheran Church*, Paradise Valley, Arizono. Foto kun permeso de John Bishop, *Organ Clearing House*.

Konkludo

La orgeno havas riĉajn historion kaj repertuaron. Ĝia komplekseco estas impona teknika atingo; aldone, pro la belegaj tubmontroj kaj skulptaĵoj, kaj la ununureco de ĉiu orgeno, ĝi krome estas konsiderinda kiel verko de arto. Oni tro ofte diras, ke “io estas pli ol nur ...” sed ĉi-okaze, tio ne estas troigo. La orgeno estas pli ol nur instrumento; ĝi vere estas nekomparebla kun iu ajn alia muzikilo! Kaj mi esperas, ke ĉi tiu artikolo donis al vi novan aprezon por la reĝo de muzikiloj.



Antaŭ la tubmontranta fasado kuŝas multe da aliaj fajfiloj, ĝenerale mezurantaj inter kvarona colo (7,5 cm) ĝis 32 futoj (9,75 m). La organfajfilo kiu sonigas mezan C (261,63 Hz) staras 8 futojn (2,4 m). Foto kun permeso de *St. Mary's Church*, Whitkirk (Leeds, Anglujo).

1. youtu.be/PxKQy4zi3R0
2. youtu.be/gLQulpjMga8
3. youtu.be/JByNwtyNo-8
4. youtu.be/uDmBKA70svc

Tempo de la mortkristanoj

beletre • Jurij ŠČERBAK, Viktor PAJUK

Ĉi tio estas elĉerpaĵo el *Tempo de la Mortkristanoj: Miraĝoj de la 2077-a jaro*, romano el 2011 verkita de Jurij ŠČERBAK kaj elukrainigita de Viktor PAJUK.

2 Aŭgusto 2077

6:00 pm, Vaŝingtono

ALVOKO

de Prezidento de la Konfederacio de Nordamerikaj Ŝtatoj

Shirley McDowle (Van Lee)

al la Popolo kaj Kongreso de Nordameriko

Miaj karaĵ samcivitanoj!

De hieraŭ ni festis kun vi la brilan venkon de la Usona Legio super la ribeluloj kaj bandoj de Zapatero, kio pruvis nian kapablon kuniĝi en la batalo por la sankta afero – liberigi la sanktan amerikan teron de invadantoj.

Sed hodiaŭ venis la tragika novaĵo: En la nokto de la 2-a de Aŭgusto 2077, neaŭdita krimo estis farita en Kijivo, la ĉefurbo de la suverena eŭropa ŝtato Ukrainujo, okupita de la trupoj de la Nigra Hordo: Oficiroj de janiĉara punkorpuso senprovoke rabis ambasadoron de la Konfederacio de Nordamerikaj Ŝtatoj, kio rezultigis la morton de ambasadoro John O'Sullivan kaj okdek sep ambasadkunlaborantoj, inkluzive de virinoj kaj infanoj. Mortis marsoldatoj, kiuj heroe defendis ne nur civitanojn de la Konfederacio, sed ankaŭ civitanojn de la ŝtatoj-membroj de la OTS (Organizo por Tutmonda Sekureco), kiuj serĉis protekton sur la teritorio de la ambasado. Speciale dolora estas la perdo de la heroo de la marsaj ekspedicioj, la fidela filo de Ameriko, William Crawford.

Kelkaj pluivaj ambasadkunlaborantoj estis nepravigeble arestitaj kaj deportitaj. Ilia restadejo hodiaŭ estas ankoraŭ nekonata.

La ambasadejo estis detruita, konfederaciaj posedaĵoj estis rabbitaj, domoj estis bruligitaj.

Ĉi tiu akra krimo memorigas la plej terurajn tempojn en la homa historio kaj estas kruda malobservo de internaciaj leĝoj kaj konvencioj pri protekto de diplomatia personaro.

La amerika popolo estas ŝokita pro la perdo de siaj plej bonaj filoj kaj filinoj, kiuj servis sian Patrujon honeste kaj kuraĝe. Ni funebras pri la senkulpaj viktimoj de la agreso de la Nigra Hordo kaj esprimas nian plej profundan

kondolencon al iliaj familioj, kaj al ĉiuj parencoj kaj amikoj de la viktimoj. Ni preĝas por la animoj de la mortintoj kaj kredas je la vortoj de Kristo: “Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj” (Mateo 5:9).

Sed ni ankaŭ scias, ke efektiviĝos la averto de Dio: “Vere mi diras al vi: Mi akriĝos Mian brilantan glavon kaj Mia mano komencos la juĝadon, tiam Mi revenĝos al Miaj malamikoj, kaj al Miaj malamikoj Mi repagos” (Readmono 32:41). Malbono devas esti punita.

Amerikanoj!

La senprecedenca banditatako de la Nigra Hordo sur nia ambasado memorigas nin pri alia malĝoja paĝo de nia historio – la atako de Japanio sur Pearl Harbor en 1941, kiu kaŭzis usonan eniron en la Duan Mondmiliton.

Mi, donitan al mi de la Konstitucio de la Konfederacio potencon, deklaras, ke ekde la 3-a de Aŭgusto 2077, la Konfederacio militas kontraŭ la Unio de Nigraj Hordaj Ŝtatoj. Mi havas la plenan subtenon de la Kongreso – kaj la Senato kaj la Ĉambro de Reprezentantoj. Mi ordonis al la Konfederaciaj Armitaj Fortoj fari serion da atakoj kontraŭ malamikaj armeaj instalaĵoj, komandejoj kaj informadcentroj uzante la plej novajn armilojn. Mi ankaŭ donis la ordonon laŭeble akceli la instaladon en la geofiksita orbito de la Batala Kosmostacio Ronald Reagan, per kies helpo ni kunordigos kaj faros strategiajn atakojn kontraŭ la Nigra Hordo.

Mi ne promesas al vi facilajn tempojn, karaĵ samlandanoj. La lukto estos malfacila kaj longa kaj postulos la mobilizadon de la klopodoj de ĉiu el vi. Sed memoru la senmortajn vortojn de prezidento John F. Kennedy, eldiritajn antaŭ pli ol cent jaroj: “*Ni faros ĉi tiujn aferojn, ne ĉar ili estas facilaj, sed ĉar ili estas malfacilaj.*”

Mi volas tuŝi alian aspekton de la tragika historio, kiu okazis en Kijivo. Jam delonge ni kun granda zorgo rigardas la eventojn en Ukrainujo – iam demokratia sendependa lando, kun kiu ni estis ligitaj per la ligiloj de strategia partnereco. Bedaŭrinde, Ukrainujo fariĝis la unua lando en Eŭropo, kie krimaj elementoj venkis, kie feŭda-diktatora reĝimo estis establita, kie libereco, honoro kaj digno de la civitano estis tretitaj de manpleno da oligarkoj. Ni provis konvinki niajn ukrainajn partnerojn pri la danĝero de tia evoluo, sed ili, kiel nun klare, intertraktis sekrete kun la Nigra Hordo kaj, kontraŭe al la naciaj interesoj de la lando, libervole fariĝis sklavo de tiu sovaĝa feŭda forto, fordonante duonon de la lando al la Nigra Hordo.

la Grotoj – sanktejo de orienta kristanismo – estis priarabita fare de la trupoj de Batu Ĥano.

Ni akuzas la nunan estraron de Ukrainujo, ĝian regantan Superan Direkcion, pri krima malsukceso plenumi siajn respondecojn por fidinda protekto de diplomaciaj misioj. Je la konscienco de la regantoj en Kijivo estas la sango de senkulpaj viktimoj de la atako de la Nigra Hordo.

Ni rompas diplomaciajn kaj aliajn rilatojn kun la kijiva reĝimo kaj ordonas al niaj policaj agentejoj esplori, kaj, se trove kulpaj, aresti helpantojn de la Nigra Hordo kaj tiujn, kiuj faciligas drogkontrabandon al Nordameriko kaj subtenas la Zapatero-ribelulojn.

Ni ne rekonas la dividon de Ukrainujo en influzonojn kaj staras por la teritoria integreco de ĉi tiu ŝtato, ĝia sendependeco.

Ni alvokas ĉiujn sanajn fortojn de la ukraina socio kontraŭstari la diktatoran reĝimon en Kijivo kaj starigi demokratian ordon en Ukrainujo. Ni subtenos la novan demokratian registaron de Ukrainujokaj la Liberigan Fronton de Ukrainujo.

Ni estas konvinkitaj, ke per la kunigitaj klopodoj de liberemaj demokrataj nacioj, ni povos venki malamikojn, kiuj volas sklavigi la homaron, returni historion al la malgajaj tempoj de sklaveco, senleĝeco, spirita mallumo kaj detruo de la kredaj fundamentoj de kristanismo.

Nia lukto estos gajnita ne tiom per la potenco de niaj armiloj, kiom per la potenco de la amerikaj idealoj de libereco, nia fido al Dio, al Lia Providenco.

Dio protektu ĉiun el vi, karaj amerikanoj. Dio benu Amerikon.

Tempo de la Mortkristanoj: Miraĝoj de la 2077-a jaro (2011) estas agopluna politika trilerio, fantazia kontraŭ-utopia romano pri proksima estonteco. La intrigo de la libro disvolviĝas sojle de la 4-a Montmilito. Post la 3-a Mondmilito kelkaj gravaj grandurboj, kiel ekzemple Detrojto, Seulo kaj Jerusalemo, estis detruitaj per atomeksplodoj. Naci-ŝtatoj aŭ kolapsis kaj estas en malkresko, aŭ aliĝis al aliancoj. La monda valuto, la globo, estis enkondukita, kaj la vera potenco apartenas al korporacioj. El Mongolio komenciĝis formado de la Nigra Hordo – kuniĝo de islamaj kaj islamigitaj ŝtatoj, kiuj iom post iom konkeris Centran Azion, Siberion kaj Mezorionton. Ĉi tio kaŭzis la ĉesigon de nafto-eksporto el menciitaj regionoj. Rusio estis dividita en apartajn ŝtatojn, la plej multaj el kiuj fariĝis parto de la Nigra Hordo, la ĉina Subĉiela imperio kaj Japanio. Ukrainio restis ekster la aliancoj, sed estas valora partnero por multaj supernaciaj kreaĵoj.

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Historio de Eduardo Vivancos

omaĝe • Xavier ALCALDE

Eduardo Vivancos [Bibáncos] naskiĝis en Barcelono en 1920, en familio alveninta el Murcio (suda Hispanujo), de humila origino kvankam kun kulturaj kaj sociaj intereso. Li partoprenis la proletan movadon dum la Dua Respubliko, floranta periodo por progresemaĵoj. Tri monatojn antaŭ sia dekkvara naskiĝdatreveno li komencis sian laboristan vivon, kaj iom poste li aliĝis al CNT, la ĉefa anarkiisma sindikato en Eŭropo.¹ Dume li studis ĉe la Laborlernejo² kaj ekde 1937 ĉe la Laborista Instituto (mezgrada) de Barcelono.³ En la tiel nomata Popola Enciklopedia Ateneo (AEP) li lernis la *racian* lingvon Esperanto, kiun li komprenis kiel esencan elementon de nova mondo konstruota.⁴ Tiel li disvastigis la lingvon inter siaj kamaradoj, korespondis kun homoj el eksterlando, verkis artikolojn, ĉeestis eventojn, organizis kursojn ktp. Membro de Liberecana Junularo kaj de Studenta Federacio de Liberaj Konsciencoj, en la Esperanto-rondoj li sentis sin proksima al Iberia Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj.⁵

Krome, li pasie praktikis atletismon. Neforgesebla memoro estas tiu pri lia trejnado en la stadiono *Montjuïc*, la tagon antaŭ la oficiala malfermo de la Popolaj Olimpikoj de Barcelono en 1936. En tiu evento li devis kuri la distancon de 5000 metroj. Ĉar la (ordinaraj) Olimpikoj en 1936 estis okazonta en la hitlera Berlino, oni proponis bojkoti ilin organizante samjare Popolajn Olimpikojn en Barcelono. Ili estis eksterordinaraj kaj el kultura kaj el sporta perspektivoj.⁶ Fine tiuj Popolaj Olimpikoj ne okazis pro la milita puĉo. Siaflanke, Eduardo ne kuros denove ĝis la 1960-aj jaroj, kiam li partoprenos en popularaj maratonoj kaj, kiel membro de la kanada nacia teamo, en mondaj konkursoj por veteranoj.

¹ *Confederación Nacional del Trabajo* (CNT) [Nacia Konfederacio de la Laboro] estas unuiĝo de anarkiistaj societoj kreita en Barcelono en 1910. Kvankam malpermesite en pluraj periodoj, ĝi elstare rolis dum la milito kaj en la socia revolucio, kiu okazis samtempe en Hispanujo. En Katalunujo ĝi iĝis la ĉefa organizaĵo de la laborista movado; en 1936 ĝi havis unu milionon da membroj. Nuntempe ĝi daŭre ekzistas, sed malpli gravas ol en tiu epoko. Anekdote, ekde sia ekapero ĝi rekomendas la studon kaj disvastigon de Esperanto kiel internacia lingvo.

² Kreite en la epoko de la industriiĝo en la tekstila fabriko *Can Batlló*, tiu institucio celis prepari la laboristojn por la eŭropa konkurenco. En 1900 pli ol duono de la barcelonanoj ne sciis skribi aŭ legi kaj do ne pretis labori en moderna industrio. En la 1930-aj jaroj ĝi renoviĝis pedagogie kaj metodologie. La plejparto de la lernantoj laboris dum la tago kaj partoprenis la kursojn de la 19-a ĝis la 21-a. Hodiaŭ ĝi daŭre ekzistas, en alia sidejo kaj kun aliaj celoj adaptitaj al la nuna kunteksto.


³ Post la komenco de la milito, la respublikana registaro iniciatis pedagogiajn eksperimentojn cele al la klerigo de la plej bonaj studentoj inter la kontraŭfaŝisma laboristaro. Tiu elito helpus rekonstrui demokration la landon. Ili devis esti laboristoj aĝantaj pli ol 15 jarojn, kun la kapablo intense trapasi mezgradan lernejon en kvar semestroj. Ili loĝis en la Instituto kune kun la instruistoj, kun absoluta genra egaleco. Multaj instruistoj estis prestiĝaj intelektuloj. La studentoj ricevis etan salajron por kontribui al la familiaj elspezoj, al kiuj, en normala situacio, ili kontribuas laborante, kiel idoj de la laborista klaso. Temis pri sekulara, scienca kaj aktiva edukado. En Barcelono ĝi situis en la (riĉa) kvartalo *Sarrià*, en konstruaĵo de la jezuitoj, en strato *Capmany*. Ĝi funkciis de Septembro 1937 ĝis Januaro 1939.

⁴ En la tiutempa Hispanujo abundis tiuj ateneoj, kiuj ĉefrolis en la socio kiel malfermitaj spacoj de klerigo kaj debato. Fondite en 1902, *Ateneu Enciclopèdic Popular* (kiel ĝi nomiĝas en la kataluna) estis unu el la plej gravaj centroj de kulturo kaj edukado por la laboristoj (kaj ne nur) en Barcelono. En la 1920-aj jaroj ĝi havis pli ol 20 000 membrojn – dum la futbala teamo *F.C. Barcelona* havis nur 5000. Evidente, temis pri alitipa socio ol tiu nuntempa. AEP organiziĝis laŭ pli ol 20 sekcioj: ekskursado, beletro, politikaj studoj, muziko, sportoj, pedagogio, scienco, Esperanto ktp, sed ankaŭ biblioteko, lernejo kaj prelegejo. Post la morto de Francisco Franco ĝi reaktiviĝis, ĉefe kiel arĥivo kaj dokumenta centro pri la laborista movado.

⁵ *Federación Ibérica de Juventudes Libertarias* (FIJL) [Iberia Junul-liberecana Federacio] estis organizaĵo de anarkiismaj junuloj fondita en Madrido en 1932. Foje ĝi estas konata simple kiel *Juventudes Libertarias* [Liberecana Junularo]. Siaflanke, *Federación Estudiantil de Conciencias Libres* [Studenta Federacio de Liberaj Konsciencoj] estis la studenta organizaĵo de la hispanaj anarkiistoj, fondita en 1935. Fine, Iberia Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (ILES) estis la ĉefa asocio de esperantistaj anarkiistoj, kiu eldonis dummilite la semajnan *Informa Bulteno* de CNT/FAI.

⁶ Ĝin decidis partopreni miloj da atletoj, kiuj malfacile povus tion fari en Germanujo, ekzemple komunistoj, judoj ktp. Estante jam en Barcelono komence de la milito, kelkaj el ili restis por lukti en Hispanujo kontraŭ faŝismo. Eble ne hazarde, la organizantoj de tiu evento uzis Esperanton (kune kun aliaj lingvoj) por komunikiĝi kun la atletoj. Lastatempe, ĵurnalistoj kaj esploristoj interesataj pri tiuj Popolaj Olimpikoj intervjuis Eduardo-n por scii pli pri ili, Ĉar malmultaj partoprenintoj daŭre vivas. Vidu, ekzemple, la dokumentan brazilan filmeton *Conheça a história das "Olimpíadas Populares", em 1936* [Ekkonu la historion de la "Popolaj Olimpikoj", en 1936], produktitan en 2016.

Sed ni revenu al 1936. Barcelono sufokis la ribelon, kaj la anarkiistoj profitis la okazon por plenumi sian deziratan socian revolucion. Al ĝi Eduardo kontribuis entuziasme, travivante spertojn, kiuj influos lin porĉiame. Pro la zorgiga disvolviĝo de la milito, li decidis iĝi volontulo de la 26-a divizio, antaŭe konata kiel Kolono Durruti.⁷ Tiam li estis deksepjaraĝa. En la fronto li suferis militajn malvenkojn, kaj ĉeestis la morton de kamaradoj, tiel maturiĝante frutempe. Li ankaŭ fariĝis kultura komisaro, instruis analfabetajn kamaradojn legi kaj skribi, kaj partoprenis la kreadon de grupo de Iberia Studenta Revolucia Federacio.⁸



Same, en la tranĉeoj li instruis al la junaj soldatoj la internacian lingvon, kaj kune ili informiĝis pri la evoluo de la milito, interalie per esperantlingvaj publikaĵoj kiel *Informa Bulteno* de CNT/FAI. Tiam Eduardo verkis taglibron, unue en la hispana kaj poste en Esperanto.⁹ Bedaŭrinde la parto en Esperanto perdiĝos dum la retiriĝo al Francujo de la respublikana armeo.

Dum la malvarma vintro de 1939, kune kun centmiloj da homoj (inkluzive de sia patro), Eduardo trapasis la Pireneojn piede. Li travivos la terurajn francajn koncentrejojn, kaj ankaŭ partoprenos laborkompaniojn en Germanujo. Temas pri jaroj da malsato kaj sufero, sed ankaŭ da solidareco kaj kamaradeco. Multaj liberecanoj dividis sian sorton; tion faris ankaŭ esperantistoj kiel la barcelonano Jaume Grau Casas, vicprezidanto de la Esperanto-Akademio kaj aŭtoro, interalie, de la libro, per kiu Eduardo lernis la lingvon, samkiel de la kortuŝa *Tagoj kaj Ruinoj*.¹⁰ Ankaŭ Eduardo daŭre verkis, sed denove preskaŭ ĉio skribita en ĉi tiuj jaroj ne atingis nin. Feliĉe, iujn el siaj aventuroj li memoros multajn jarojn poste, kiel tiun tagon, kiam, laborante je la plifortigo de la tranĉeoj por defendi Parizon kontraŭ la alveno de nazioj, li estis konfuzita kun germana paraŝutisto...

Post la fino de la mondmilito, Eduardo loĝis en la franca ĉefurbo. En Parizo li aliĝis al Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kaj partoprenis la liberecanajn rondojn de la hispanaj rifuĝintoj.¹¹ Tie konatiĝis li kaj Ramona, al kiuj naskiĝis Floreal kaj Talia; kaj tien alvenis, post odiseado tra la pirenea montaro, liaj patrino kaj fratino (Julieta). Ĉi-lastata entuziasmiĝis pri Esperanto, kaj ekde tiam ambaŭ gefratoj komunikiĝas en tiu lingvo. Poste, jam en Kanado, ankaŭ la gepatroj fariĝos esperantistoj.

En Parizo, Eduardo ludis kernan rolon en la liberecana movado. Li redaktoris *Senŝtatano*-n, la bultenon de Internacia Anarkiisma Junularo, tute eldonatan en Esperanto. En ĝi kunlaboris eminentaj aktivuloj, kiaj Germinal Gracia (V́ctor Garća), Vicente Garća Cort́s (Fontaura), Luis Pintado (Helios Volga) aŭ la junaĝe forpasinta Raúl Carballeira.¹² En periodo, kiam ne ekzistis diplomaciaj rilatoj inter Hispanujo kaj Francujo, pere de siaj korespondantoj en diversaj landoj, ĉi tiu publikaĵo faciligis poŝtajn komunikojn inter la ekzilitoj kaj iliaj familioj. Krome ĝi kontribuis al la plifortigo de la rilatoj inter eŭropaj kaj aziaj liberecanoj. Jarojn poste, Eduardo tradukos la ĉefan verkon de Lao Tsé al la hispana, pere de versio en Esperanto farita de Taiji Yamaga. En 1993, okaze de monda konkurso pri atletismo por veteranoj, Eduardo vizitos la familion de Yamaga en Japanujo. Li vizitos ankaŭ Ĉinuĵon, kaj skribos detale pri tiuj vojaĝoj en la revuo *Flama* [Flamo] de *Casal dels Països Catalans* [Centro de la Kataluna Landaro] de Toronto, asocio kun kiu li kunlaboris regule dum pli ol jardeko.

Sed ni revenu al la fadeno de nia historio, kiun ni forlasis en Parizo. Kiam evidentiĝis, ke la faŝisma reĝimo en Hispanujo daŭros, Eduardo kaj lia familio decidis translokiĝi al lando proponanta pli bonajn eblecojn al enmigrantoj: Kanado. Estis la jaro 1954. En Toronto ili ekkontaktis hispanajn ekzilitojn, sed ankaŭ la lokan Esperanto-movadon, kiu helpis ilin orientiĝi en tiu nova etapo. Siaflanke Eduardo estos ĝia motoro dum jardekoj, instruante la lingvon al pluraj



⁷ Ĝin gvidis Buenaventura Durruti, konata anarkiisto kaj batalanto, kiu mortis la 20-an de Novembro 1936 en Madrido. La homamaso, kiu kuniĝis por adiaŭi lian korpon en Barcelono du tagojn poste, konsistigis la plej grandan manifestacion okazintan en Hispanujo dum la milito.

⁸ *Federación Ibérica Estudiantil Revolucionaria* (FIER) [Iberia Studenta Revolucia Federacio] estis la nomo, kiun havis *Federación Estudiantil de Conciencias Libres* ekde Oktobro 1937. Vidu piednoton 5.

⁹ Parto de ĉi tiu ĵurnalo lastatempe aperis en la revuo *Beletra Almanako* (n. 33, 2018, pp. 35-62).

¹⁰ Publikigite en la franca en 2014 (*Ulysse dans la boue*, Marenostrom, eldono de Marie-Hélène Meléndez) kaj en Esperanto en 2017 (*Tagoj kaj Ruinoj*, SATEH, eldono de Miguel Fernández), ĝi klarigas la spertojn de la aŭtoro en la francaj koncentrejoj. En la hispana lingvo ĝi baldaŭ aperos, eldonate de Nacia Universitato de Jedistanca Edukado, UNED.

¹¹ Almenaŭ ekde 2013 Eduardo Vivancos estas la plej malnova membro de SAT.

¹² Interkrampe, mi mencias iliajn plumnomojn.

generacioj de esperantistoj, kaj efike organizante publikajn aranĝojn. En 1973 okazis tie la unua SAT-kongreso ekster Eŭropo. En 1987 estis la vico de granda ekspozicio en la urba biblioteko. Samjare li kunordigis la aperigon de plurlingva filmo por la disvastigo de Esperanto, registrante la versiojn en la kataluna kaj en la hispana, kaj ankaŭ tiun en la lingvo internacia.

En Toronto li kunfondis sportan klubon por veteranoj. Tie li estos tre aktiva membro, kaj en ĝia sporta kaj en ĝia socia dimensioj. Aliflanke, lia laboro en la poŝta oficejo ebligis al li realigi longe deziratan revon: Studi universitate la hispanan literaturon. Kiom fieraj estis liaj gepatroj, kiam li sukcese kompletigis siajn licencion kaj magistriĝon! Li povus iĝi universitata profesoro, sed preferis resti en sia laborejo. Koncerne la rilaton de la familio Vivancos kun la hispana komunumo de la urbo, ĝi kreigis nature, kaj baziĝis sur interhelpo kaj reciproka subteno. Jen anekdoto pri: Sekve de la vundoj ricevita en bokso-matĉo, hispana boksisto ne kapablis prizorgi sian familion. Eksciinte pri tio, Eduardo kaj Ramona proponis loĝigi unu el liaj infanoj en sia hejmo. Kaj tion ili faris, ĝis la familio de la boksisto decidis reveni Hispanujon.



Dume, Eduardo korespondis kun ekzilitoj en multaj landoj, verkis pri Esperanto en liberecanaj publikaĵoj, kaj kunlaboris kun Internacia Solidareco Kontraŭfaŝista.¹³ Krome, la tuta familio partoprenis regule en la eventoj organizataj de *Canadian-Spanish Association for Democracy* [Kanada-Hispana Asocio por Demokratio]. En tiu ĉi kunteksto, Eduardo organizis la viziton al Toronto de konataj figuroj de la kontraŭfaŝisma lukto, kiel Federica Montseny, CNT-gvidanto kaj membro de la hispana registaro en la 1930-aj jaroj; aŭ Enrique Tierno Galván, iama membro de Liberecana Junularo kaj estonta urbestro de Madrido en la nova hispana demokratio. Aliflanke, Eduardo publike kontraŭis la okazigon de la madrida UK en 1968. Temis pri polemika evento, inaŭgurita de la frato de la ministro pri informado kaj turismo Fraga. Krome, la diktatoro Francisco Franco estis agnoskita kiel alta protektanto de la kongreso, fakto ankoraŭ kritikata en la debatoj pri la neŭtraleco de UEA.

Lia plej konata teksto estis *Esperanto. Unu lingvo por ĉiuj*, publikigita origine en monografia kolekto de la anarkia revuo *Ruta* [Itinero], eldonita en Venezuelo de Germinal Gracia. Tiu Kihoto de la Idealo¹⁴ ĉeestis la SAT-kongreson de Toronto en 1973 kaj petis de Eduardo, eble la homo kiu plej bone enkarnigas la rilaton de la internacia lingvo kun la liberecanaj ideoj, ke li verku pri Esperanto. Post tiam tiu ĉi teksto konis rimarkindan disvastigon, kaj ĝi restas unu el la plej citataj verkoj pri Esperanto en la hispana lingvo. Okaze de la centjariĝo de la unua gramatiko publikigita de Zamenhof, aperis en 1987 dulingva franca-esperanta versio fare de la grupo Fresnes-Antony de *Fédération anarchiste*. Por la nuna eldono ĝi baziĝis sur la originala versio, kiun SATeH ciferecigis antaŭ kelka tempo, kaj sur la traduko al Esperanto farita de la francaj liberecanaj kamaradoj.

Ĝis la fino de sia vivo, Eduardo Vivancos daŭre aktivis mense, sed fizike lia aĝo ĉiam pli sentebilis. Li aperis en la listo de aliĝintoj al la SAT-kongreso de Barcelono (2019), ĉar li aliĝis solidare, sciante, ke tiam li ne povis vojaĝi al sia amata naskiĝurbo. Post la morto de la diktatoro li vizitis Barcelonon plurfoje, unue kun la celo gustumi denove la frandan *botifarra amb seques*.¹⁵ En 1986, li ĉeestis la SAT-kongreson okazintan en la apuda urbeto Sant Cugat, kie li prelegis pri siaj propraj spertoj dum la socia revolucio de 1936–1939. Estu ĉi tiuj paĝoj omaĝo al centjara vivitinero de sinofero kaj kohero, amo al libero kaj lukto por pli bona mondo.

¹³ *Solidaridad Internacional Antifascista* (SIA) [Internacia Solidareco Kontraŭfaŝista] estis fondita en Majo 1937 de CNT kaj aliaj liberecanaj organizaĵoj, kiel *Federación Anarquista Ibérica* (FAI) [Iberia Anarkiista Federacio] kaj FIJL, t.e. Liberecana Junularo. Kiel humana kaj politika organizaĵo favore al anarkiismo, ĝi kreigis por respondi al la superregado de la komunistoj kaj iliaj organizaĵoj (ekz. *Socorro Rojo Internacional* [Internacia Ruĝa Helpo]) en la publika vivo kaj politiko dum la milito.

¹⁴ *Los Quijotes del Ideal* [La Kihotoj de la Idealo] estis afinecgrupo de la Liberecana Junularo, kiu asertis la anarkiistan idealon kaj denunciis la partoprenon de anarkiistoj en la kataluna kaj hispana registaroj dum la milito. Ili publikigis semajne la artan kaj sociologian revuon *El Quijote*. Ĝi estis eldonata en la barcelona kvartalo Gràcia de la 11a de septembro 1937 ĝis la decembro de tiu jaro. Kelkaj el ĝiaj fondintoj estis Diego Camacho (Abel Paz), Liberto Sarrau, Germinal Gracia kaj Federico Arcos. Pri Ĉiu el ili indas menciigi anekdoton. Unue, Diego Camacho famiĝis kiel verkisto, kaj aŭtoris konatan biografion de la revoluciulo Durruti; en la procezo de verkado li korespondis kun Eduardo cele al la akirado de informoj, ĉar Eduardo partoprenis la tiel nomatan Kolonon Durruti. Due, same kiel Eduardo, ankaŭ Federico Arcos ekziliĝis al Ontario (Kanado); pro tio, ke Federico loĝis en Windsor, 80 kilometrojn for de Toronto, ili amikiĝis kaj renkontiĝis ofte. Trie, kiel dirite, Germinal kaj Eduardo kunlaboradis en la Parizo de la 1940-aj jaroj pri la eldonado de *Senŝtatano*. Kvare, Liberto havis unu filon, kies nomo estis Suno (notu la esperantan vorton).

¹⁵ Temas pri kataluna kolbaso kun blankaj fazeoloj, tipa kataluna manĝaĵo.

Letero al la nevo

rakonte • LUA HALL

Ho, kara Tokipono! Ankoraŭ juna kaj brila, kiel la tagon, kiam vi venis en la mondon.

Kiel la tempo pasas! Mi memoras, kiam vi havis nur cent dudek vortojn. Nun, de nur kelkaj jaroj, vi aĝas sufiĉe por trinki alkoholaĵon, kvankam vi ŝajne ne emas fari tion. Nek mi, verdire.

Ĉu vi multe pripensis ĝis nun, kia lingvo vi volas esti, kiam vi estos plenkreska? La lingvo de bono, jes? Ĉiu lingvo opinias sin bona, ĉu ne? Sed, mi konfesas, vian ideon pri boneco mi ja taksas *impona*! Kial paroli multe, se malmulte sufiĉas?

Sed ĉu vi sciis, ke vi iam estus eble la plej rava lingvo en la mondo? Jes, aliaj estas pli konataj, kaj aliaj estas pli parolataj, sed aliaj ne sentigas tian entuziasmon, kiel vi.

Kaj kian reputacion vi gajnis, kiel “la plej facila lingvo”? Kia respondecas sur viaj ŝultroj, ĉu ne? Mi ne plendas, se vi prenas tiun rolon de mi. Sed mi scias, ke vere en via animo troviĝas riĉa, esprimoplena idiomo.

Ĉu vi iam ajn konsideras ŝanĝi la karieron? Ne estas tro malfrue por celi mondan famon. Vi povus sendi homojn al la kosmo. Vi povus krei religion. Vi povus politike kampanji. Vi povus servi kiel sekreta komunikilo.

Nu, oni neniam scias, kiel la sorto iros. Foje mi volis fariĝi ĉies dua lingvo. Aŭdace, ĉu ne? Mi kredis, ke per komuna lingvo, per forigo de lingvaj bariloj, la homaro kunvenis en paco.

Mi lernis, ke pacon lingva konkero ne faras. Simple demandu Anglalingvon.

Necesis por mi iom da tempo, sed miaj prioritatoj ŝanĝiĝis dum mi pliaĝiĝas. Mi havas familion por prizorgi — grandan rondon familian. Enfine, mi akiris ion eĉ pli belan ol mi celis. Mi ne havas la mondon; la mondo havas min. Kaj nun, la mondo havas vin.

Sed vi ne bezonis tiom da tempo, kiom bezonis mi. Vi komprenis de la komenco. Viaj ambicioj estas pli puraj. Simpleco estas kara al vi. Vi atingis gradojn de neŭtraleco kaj inkluziveco, kiujn mi nur revis. El pli diversa ŝtofo vi kudris mondan tapeton eĉ pli buntan.

Mi esperas, ke vi pardonos mian mankintan klerecon. Mi kondukis tiel bone, kiel mi povis, naskiĝinte en la mezo de Eŭropo en epoko antaŭ la Interreto!

Mi volas, ke niaj familioj amu unu la alian. Multajn parencojn ni kunhavas. Ni estas pacemaj lingvoj — ni ne bezonas kvereli.

Ĉiuokaze tamen, daŭre sekvu vian propran vojon. Vi neniam bezonis min. Rigardu, kian grandan potencon havas tiel malgranda lingvo! Kiel mia patro foje diris al mi: *“Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.”*

Esperante ĉian bonon al vi, salutas

via Onklo, Esperanto.

Ĉi tiu artikolo estis verkita por la tokipona revuo *lipu tenpo*, por ĝia eldono je 1 Aprilo, *nanpa kokosila* (numero Krokodilado), en kiu rajtis aperi ajna planlingvo krom Tokipono.

Joruba teksado

kulturo • Wale OGUNYALE, Chelsea MOSES, Alena ADLER

Aŭtoris Wale OGUNYALE en la angla; esperantigis Alena ADLER post Chelsea MOSES. Fotoj de Wale OGUNYALE.

Enkonduko:

Teksado de ŝtofoj, tradicia profesio en multaj urbetoj de la *Yorùbá* (joruba) popolo, nun ekmalaperas. Jen la temo de mia esplorprojekto. Ĉi tiu seminaria projekto estas postulo por majstriĝo en Komputaj Lingvo kaj Dokumentado ĉe la Universitato de Uyo, Niĝerio. Mi entreprenis la dokumentadan projekton por konservi la jarcentan metion kaj ĝiajn procezojn.

Aparte grava estas la specialigita vortprovizo, uzata por referenci ilojn, materialojn, stilojn, procezojn, kaj pli en ĉi tiu indiĝena metio. Ĉi tiu vortprovizo konserviĝas en ilustritan sonvortaron. La esploron ebligis ĉefe subvencio de *Esperantic Studies Foundation* (ESF), organizo al kiu mi tre ŝuldas.

Aŝo òfì / aŝo òkè – teksitaj ŝtofoj

Aŝo òfì, populare konataj kiel aŝo òkè, estas tradiciaj jorubaj ŝtofoj teksitaj per senelektraj teksiloj. Tiujn ŝtofojn, kaj la vestaĵojn faritaj el ili, kutime portas festantoj kaj partoprenantoj dum ceremonioj kiel tradiciaj geedziĝoj, instalaĵoj de tribestroj, naskiĝtagoj, entombigoj, festivaloj, ritoj kaj pli.

La teksado de aŝo òfì estas tradicia profesio inter la joruba popolo de sud-okcidenta Niĝerio. Tamen, tiu ĉi profesio estas rimarkinda nur en malmultaj jorubaj urbetoj, ekzemple *Ìsẹ̀yìn*, *Ìlọ́rín*, *Èdẹ̀*, *Ọ̀wọ̀*, *Ilẹ̀sà*, *Ìjẹ̀bú* kaj *Ọ̀yọ́*. Inter ĉiuj el la jorubaj urbetoj, kie la produktado de aŝo òfì oftas, *Ìsẹ̀yìn* aparte elstaras. Laŭ ĉefo Adeyinka Adeleke, komunumestro en *Ìsẹ̀yìn*, "*Ìsẹ̀yìn* estas la fundamento de aŝo òkè, kaj neniuj aliaj urbetoj egalas al *Ìsẹ̀yìn* en la teksado de aŝo òkè." *Ìsẹ̀yìn*, urbeto ĉirkaŭ 220 km for de Lagos, estas rigardata kiel ĉefsidejo de la teksado de aŝo òfì.

Aŝo òkè estas alternativa kaj pli populara nomo por aŝo òfì. "*Òkè*" estas mallongigita formo de "*ilú òkè*" — termino, kiun urbanoj, precipe de Lagos, uzas por aludi la kamparon. Laŭ populara rakonto, la kamparo, de kiu la teksita ŝtofo ricevis sian nomon, temas pri la urbeto *Ìsẹ̀yìn*, de kie multaj teksistoj vojaĝis (kaj ankoraŭ vojaĝas) al Lagos por vendi siajn teksitajn ŝtofojn.

Malgraŭ la fakto, ke aŝo òfì estas elstaraj tradiciaj ŝtofoj jorubaj, ĝiaj procezoj estas iom enigmaj, eĉ al multaj ĝiaj portantoj. Por dokumenti la produktadon de aŝo òfì, mi vojaĝis el la Universitato de Uyo al *Ìsẹ̀yìn*, kaj ankaŭ al *Ìbàdàn* kaj *Ilẹ̀sà*.

La kreoprocezoj de aŝo òfì konsistas el tri fazoj: varpado, veftado, kaj teksado.

Procezoj de varpado

Varpo estas la tuta longo de la fadenoj, kiuj starigas vertikale sur la teksilo. Jorubaj teksistoj nomas la varpon aŝo, kiu estas la termino ankaŭ por jam teksita peco sur la teksilo, kaj por ŝtofo ĝenerale. Varpado komenciĝas per aŝo tita (preparado de la varpo), kiun oni



faras sur plata tero, kiun oni jam mezuris por taŭgi al la longo de unu fadenfasko (ĉirkaŭ naŭ metroj). Depende de tio, kiom da faskoj oni preparas, du aŭ pli da varpstangoj — *sánrin* — marteliĝas en la teron ĉe ĉiu flanko. Fadenoj por la varpo estas starigitaj en *òdádàà*, aŭ elbobenilo (bobenujo, kiu ellasas iom post iome fadenojn), kaj la fadenoj estas disvastigitaj sur la varpostangojn. Post tio, la varpo estas volvita en ovalan formon.

Poste, *fẹ́rẹ́n* (finaĵoj de la varpo-fadenoj aŭ varperoj) estas enmetitaj unue en la varpertenilojn, *omú*, kiuj movas la fadenojn supren aŭ malsupren, kaj sekve en la dentaron (*àsà* — kombilforma apartigilo, kiu izolas ĉiun varperfinaĵon disde la aliaj). Aŭ la majstra teksisto aŭ superaj lernantoj kun pli da sperto kutime faras ambaŭ tiujn du taskojn per la teksilo. La procezo de enmetado de varperfinaĵoj en la varpertenilojn estas konata kiel aŝo riri sínú omú, kiu signifas 'tredi'. Dum tredado, la varpo estas tenata en la maldekstra mano, kaj ĉiu varpero estas tranĉita en du partojn. Unu duonparto trediĝas en la antaŭan varpertenilon, dum la alian duonparton oni treditas en la malantaŭan varpertenilon.

La sekva paŝo estas enmeti la varperfinaĵojn en la individuajn dentojn de la dentaro, procezo nomata *aŝo rírí sójú àsà*. Du varperfinaĵoj estas metitaj en ĉiun denton; la du estas efektive unu varpero, tranĉita en du pecojn kaj enmetita en la varpertenilojn. Notu, ke de la loko, kie la dentopasigo komenciĝas, neniun dento preterlasiĝu — ĉiu ricevu sian varpfinaĵan fadenon ĝis elĉerpo de la tuta varperfinaĵaro – de la tuta varpo.

Aŝo rírí (tredi kaj dentopasigi) povas esti tempopostula; tamen, ekzistas pli rapida alternativo konata kiel *kókó síso* aŭ *aŝo síso* (varponodado). Por fari tion, tranĉante la lastan teksaĵon for de la teksilo, la teksisto retenas fadenojn de ĝiaj varperoj en la varperteniloj kaj dentaro. La komenco de nova varpo tiam estas node ligita eron post ero al la finaĵoj de la antaŭa varpo. Ĉi tiu metodo okupas konsiderinde malpli da tempo por komenci la sekvan teksaĵon ol tredi kaj dentopasigi la novan varpon.



La antaŭlasta ŝtupo en la procezo de varpado estas nodligi la varpfinaĵojn al la ŝtofotena trabo (*agbɔnrin*), bastono, sur kiu la teksita ŝtofo estas rulita. La fina fazo estas *aŝo nínà*, etendi la varpon de la teksilo super vasta teksadogrundo (*òde*). La varpo estas tiam ŝlosita per pinglego (*òkééke*) sur la glitilo (*òkùku*) kaj ŝtona pezo (*òkúta*) estas metita sur la glitilon por streĉi la varpon.

Procezoj de veftado

Vefto, konata kiel *àkàwú* aŭ *àkáró*, estas la fadeno, kiu estas pasigita de flanko al flanko dum teksado. La procezoj de veftado komenciĝas per volvado de fadeno, kiu konsistas el kvin fadeneroj, en faskan rondon (*eékún*) per metala fadenvolvmaŝino nomita *ẹrọ idáwùú*. La fadenfasko estas tiam amelita, etendita sekige en la suno, lavita en akvo, kaj poste metita sur *akata* aŭ *ayí* — pendantan turnan aparaton — kaj de tie bobenita sur bobenojn (ankaŭ tiuj nomiĝas *àkáró*) uzante rotaciantan akson el ligno aŭ metalo, kiu nomiĝas *kèkè* aŭ *kómáa*-bobenilo.

Bobenigo de la vefto kutime estas taskita al junaj metilernantoj. Antaŭ la invento de maŝina bobenilo, spindeloj (*kòkògún*) estis uzataj, sed ili nun malofte troviĝas. Alia moderna enkonduko en la vefto-farado estas la uzo de gluo (ekzemple *Top Bond*) anstataŭ amelo; jen amelo jen gluo estas uzataj nuntempe por rigidigi la teksaĵon.

Teksado

La vefto (*àkàwú*) sur sia bobeno estas enmetita en boatforman navedon (*ọkọ*). Per premo de pedalo (*itèsè*), en la varpo kreiĝas malfermaĵo aŭ “ŝedo” (*ẹnu aŝo*) — tiel nomata pro ties triangula prisma formo. La navedo kun la vefto estas tiam ĵetita jen dekstren jen maldekstren tra diversaj ŝedoj (kun malsamaj levitaj varperoj per apartaj pedaloj) kaj la veftero estas kunprembatita en sian lokon per la batilo (*àsà*). La procezo de interplektado de la vefto kaj vefteroj, kaj batado de la vefteroj en siajn lokojn, estas konata kiel *aŝo wíwun* — teksado.



Notu bone: Skiza vortaro de *aŝo òfi* kreita kadre de ĉi tiu projekto estas disponebla ĉe webonary.org/ofi_weaving/.

Dankoj

Ĉi tiu dokumentadprojekto estis financita de *Esperantic Studies Foundation*, al kiu mi ŝuldas multan dankon. Mi esprimas mian sinceran aprezon al mia vokto, prof. Eno-Abasi Urua, pro ŝiaj subteno kaj gvido.

Mi deziras danki ankaŭ s-ron Chuck Mays pro lia subteno. Mia elkora danko iras al mia bona amiko Clement Echa pro liaj konsilo kaj kuraĝigo.

Multan dankon al la konsultiĝaj majstroteksistoj en *Işeyin*, *Ibadan*, kaj *Ileša*.

Konsiloj por vojaĝemuloj

de la redakcio • Alena ADLER

Dum leĝoj kaj reguloj ŝanĝiĝas en Usono, por plani vojaĝon kiu inkluzivas trapason de landlimo en Usonon, endas informiĝi pri la diversaj faktoroj, kiuj povus influi la glatecon de la vojaĝo. Ĉi tiu artikolo intencas informi vojaĝantojn ĝenerale, sed plej specife usonanojn, kiuj deziras vojaĝi eksterlanden kaj poste reveni al Usono, kun apartaj informoj por genre kviraj usonanoj, kiuj spertas pli komplikitan situacion. Pli frua malneto inkluzivis informojn por eksterlandanoj; por konservi spacon, tiujn informojn ni eventuale publikigos en estonta numero. Eksterlandanoj, kiuj jam planas vojaĝon en Usonon estas bonvenaj kontakti nin ĉe bulteno@esperanto-usa.org por pli specifaj konsiloj.

Iuj ĝeneralaj konsiloj por ĉiuj estas, ke oni dum la periodo antaŭ la vojaĝo atentu aktualigojn pri ŝanĝoj al leĝoj kaj reguloj, kaj ke prefere oni faru maksimumajn eblajn preparojn, anstataŭ la minimumajn postulitajn, por espereble eviti malfruigojn ĉe la doganejo je (re)eniĝo. Pli bonas prepari ion nebezonestan, ol alveni al la doganejo kaj informiĝi, ke io ne estas en ordo. Vojaĝdokumentoj povas bezoni pli da tempo por ricevi ol atendite. Ne aĉetu vojaĝbiletojn ĝis vi ricevis la bezonestajn permeso-dokumentojn.

Vojaĝdokumentoj por civitanoj

Usonaj civitanoj atendu pli rigorajn kontrolojn ĉe la landlimo je reeniro — doganistoj estas ordonitaj, ke ili kontrolo ĉiujn, kiuj eniras Usonon, maksimume atente. Komprenu, ke multaj el la leĝoj kaj reguloj restas neŝanĝitaj, sed ke la apliko kaj kontrolo pri kaj malnovaj kaj novaj reguloj estas multe pli striktaj kaj oftaj, kaj ke la sekvoj estas pliaj. Gravus, ke dokumentoj estu liter-perfektaj. Ne kunhavu malpermesitaĵojn, nek neglektu rimarkigi kunportaĵon rimarkendan. Certigu, ke via vojaĝdokumento, ĉu pasporto, pasporta karto aŭ stirpermesilo *Real ID* validos ankoraŭ ses plenajn monatojn preter via reenirdato en Usonon. Ekde la 7-a de Majo, almenaŭ *Real ID* postuliĝos al ĉiuj usonanoj por ĉia enlanda flugo. Eblas vojaĝi al Kanado, Meksiko, Bermudoj, kaj Karibio per ŝtata identecdokumento *Real ID*, sed ne aviadile — nur boate, aŭte, trajne, buse, ktp.

Leĝaj enloĝantoj de Usono, kiuj ne estas civitanoj kaj do ne havas usonan pasporton, povus bezoni ne nur formularon I-551 (tielnomata “verda karto”) sed ankaŭ vojaĝdokumenton (reenirpermesilon — formularon I-131) — aparte personoj, kiuj ne povas ricevi pasporton de sia hejmlando. Enloĝantoj de Usono sen permesiloj restadi

estos detenitaj de la doganistoj. Tiaj enloĝantoj kunportu ĉiam pruvojn pri loĝado en Usono de la lastaj du jaroj, eĉ for de ajna landlimo. Prezento de tiuj dokumentoj pliprobabiligas, ke la rajto al *habeus corpus* estos respektata.

Aparatoj kaj profiloj

Ĉiu, kiu preterpasas la landlimon en Usonon, ĉu civitano, enloĝanto aŭ eksterlandano, lastatempe spertas multe pli rigorajn kontrolojn pri siaj aparatoj. Rekomendindas vojaĝi kun kiel eble plej malmultaj aparatoj, kiuj povas enhavi aŭ ligi informojn pri vi. Estas por la usona dogano nun norma praktiko traserĉi telefonojn, tekokomputilojn kaj aliajn aparatojn por socia medio, privataj mesaĝoj aŭ fotoj, kiuj povus indiki kontraŭregistarajn sentojn, aŭ ke homo povus favori aŭ interesiĝi pri individuoj aŭ grupoj, kiujn la registaro aktuale supozas malicaj al Usono, inkluzive de religiaj figuroj.

Sciu, ke oni povas malebligi malfermon de viaj aparatoj per vizaĝo aŭ fingrospuro, kiajn metodojn la dogano povas uzi por malŝlosi la aparaton. Antaŭ ol ekvojaĝi, indas sekurigi kontojn ĉe sociaj retejoj ktp, ke viaj informoj estu nur private alireblaj, kaj ne videblaj de la ĝenerala publiko. Ankaŭ indas elsaluti el kontoj kaj sociaj retejoj, malinstali la apojn, kaj komplete malŝalti la aparatojn antaŭ trapaso de doganejo. Se vi estas devigita ŝalti la poŝtelefonon, aktivigu “aviadilan reĝimon” (*airplane mode*). Per permeso de pli altranga doganisto (kaj okaze de “*reasonable suspicion*”, alivorte ‘sufiĉa kialo’) la doganistoj povas serĉi eĉ forigitajn informojn kaj malinstalitajn apojn per specialigitaj iloj, kiuj malkovras datumojn kaj de aparatoj kaj de datumkonserviloj kiel SIM-kartoj, memorstangetoj kaj datumdiskoj — kaj ebligas elŝuti datumojn. Konservu personajn informojn en sekurigita nelokdependa (nuba) servo por reenstalo post (re)eniĝo en Usonon.

Eblas sendi aparatojn poŝte, sed tamen, indas enterpreni similajn sekurecprocedojn, aŭ okaze de datumdisko, ĉifradon. Eble iuj elektos vojaĝi kun unu-uza malsaĝa telefono, kiu neniam ligiĝis al sociretejoj, la kutima telefon-numero, aŭ la kromnomoj, kiujn oni jam uzis en la Interreto aŭ aliloke. Eblas aĉeti SIM-karton post alveno, ke informoj eventuale konservitaj de la dogano ne inkluzivu telefonnumeron, kiu ebligas al doganistoj spuri mesaĝojn poste ricevitaĵajn. Alia sekurigmaniero estas la kreo de alternativa profilo por vojaĝado, kun kontoj ĉe kelkaj sociaj retejoj aŭ apoj sen enhavo interesa al doganistoj.

Al demandoj de la doganistoj gravas respondi per verdiro, kaj eviti ŝercojn. Laŭ oficialaj leĝoj (kiam ĉi-artikolo presiĝis), vi rajtas rifuzi personajn demandojn pri viaj religio, politikaj opinioj, aŭ sociaj retejoj. Tamen, tiaj demandoj ne plu maloftas, kaj laŭ la *American Civil Liberties Union (ACLU)*, rifuzo respondi povas longigi detenon kaj priserĉadon al civitano. Duagrada serĉo je homoj, valizoj, kaj aparatoj ofte okazas en aparta loko, kiu povas esti malkomforte malvarma. La dogano ne leĝe rajtas rifuzi reeniron al usona civitano. Krom portempa tenado de civitanoj kaj ties pasportoj, nenia validigita raporto ekzistas, ke ajna usona civitano seniĝis de pasporto dum reeniro en Usonon pro ajna kialo ĉi-jare, ĉu pro enhavo de aparatoj, politikaj opinioj, haŭtkoloro, sekso, aŭ genra identeco.

Por transgenruloj kaj aliuloj

De la 20-a de Januaro nova ordono postulas, ke identecdokumentoj provizitaj de la registaro akordu kun la ĉe-naske asignita sekso — aŭ iĉa, aŭ ina. Notu bone, tio estas “akordu”, ne “akordiĝu” — la pasportoj de transgenraj, neduumaj kaj interseksaj usonanoj plu validos ĝis validec-limdato. Tiuj usonanoj povus bezoni pli da tempo por ricevi novajn aŭ renovigitajn pasportojn pro nova ordono.

Pasporta petilo, en kiu civitano petas genromarkon X, aŭ genromarkon ne kongruan kun la duuma sekso rimarkigita je naskiĝo, estos suspendita. Eventuale la civitano povus ĉiukaze ricevi pasporton kun genromarko laŭregistare “kongrua kun niaj datumoj” (laŭ la indikoj ĉe iuj ricevataj pasportoj). Iuj homoj, kiam ili ricevis sian pasporton, ne rericevis siajn kunsenditajn pruvdokumentojn postulitajn por ricevo de pasporto, kiuj indikis genron ne kongruan kun registara ordono. Alia rericevis kun la renovigita pasporto siajn kunsenditajn pruvdokumentojn detruitajn, malnovan pasporton parte fandita, kaj naskiĝatestilon disŝirita kun partoj mankantaj kaj parto bruligita.

Identecdokumentoj, kiam ne kongrua kun la priskribo de la individuo, aŭ tio de observantoj, povas kaŭzi problemojn por la tenanto, ekzemple, pli ĝena persona serĉado. Foje, nur sinidentigo kiel transgenrulo, neduumulo aŭ interseksulo povas klarigi la situacion, malgraŭ risko. Aliaj problemoj povas okazi, kiam ĉiuj dokumentoj ne interakordas. Ash Lazarus Orr, transgenra aktivulo el Okcidenta Virginio, kun sep aliaj engaĝas la registaron en proceso por la rajto ricevi pasportojn laŭ la regularo de antaŭ la nova ordono. La 25-an de Marto, la kortumo estis petita paŭzi la ordonon, kaj respondo verŝajne venos baldaŭ. Se tia paŭzo okazos, ĝi malfermos mallongan periodon dum kiu oni povos peti renovigon aŭ novan pasporton laŭ la antaŭa leĝo. Tipe, plenkreskula pasporto povas renoviĝi iam ajn, kaj ne devas atendi ĝis specife limigita periodo antaŭ ties validec-limdato. Tamen, tio, kio eblos sub eventuala ordono, ankoraŭ ne scieblas. Se oni bezonas novan pasporton, kion ĝenas la ordono de 20 Januaro, indas teni sin informita pri la proceso, okaze de alia eblo ricevi konvenan pasporton.

Kanado akceptas kaj genromarkon X, kaj transgenrajn vojaĝantojn, same glate kiel cisgenrajn vojaĝantojn. Rilate al hejmeniro al Usono post eksterlanda vojaĝo, povus helpi al transgenruloj elprinti ekzempleron de la ŝtata ordono kaj kunhavi kromajn dokumentojn, ekz. ekzempleron de naskiĝatestilo. Ĉi-momente, spertuloj konsilas uzon de *Real ID* al transgenruloj por flugoj enlandaj, anstataŭ pasporto. Por transgenrulo, kiu volas eviti ĝenan personan serĉadon, buso aŭ trajno povus esti la plej glata maniero vojaĝi al Kanado aŭ Meksiko.

Esperantistoj havas historion de interinformado, kuraĝo kaj aŭdaco. La nuna situacio ne estas laŭ antaŭaj kulturaj aŭ leĝaj normoj, sed laŭ *niaj esperantaj* normoj, ni informas unu la alian, ni vojaĝas laŭ niaj kapabloj, ni esperantumas kun kolegoj iel ajn, kiel ni povas. Jen nia kulturo jam de pli ol jarcento tra diversaj malhelpoj. Ankoraŭ nenio haltigis Esperanton.

Kolofono

Usona Esperantisto estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–2000 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al bulteno@esperanto-usa.org.

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en № 2025:2 estas la **8-a de Junio**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

Redakcia teamo: Alena ADLER kaj Lua HALL.

2025 Balotado de Esperanto-USA / 2025 Esperanto-USA Board Election
Kandidataj Biografietoj kaj Fotoj / Candidate Statements & Photos
plus klarigo de proponita ŝanĝo al la statuto
including clarification on proposed change to the bylaws

POR SEKRETARIO (elektu nur unu) / FOR SECRETARY (choose one):

Charlotte BURTON (nuna sekretario, rekandidatiĝas / incumbent, running again)



Mi eklernis Esperanton en 2011 kaj tuj ekamis ĝin. Mi helpis pri la Landa Kongreso en Dalaso dum 2012. Post tiam, mi helpis traduki la faman verkon de H.P. LOVECRAFT, “La Voko de Htulo” (angle, “The Call of Cthulhu”). Dum 2013, mi instruis retan kurseton pri Esperanto kaj pro tio filmis serion de videoj pri Esperanto, nomata “Esperanto 101.” Ekde 2014, mi estis estrarano de Esperanto-USA, kaj ekde 2022, mi estis sekretario de Esperanto-USA. Dum tiu tempo mi lernis multe kaj helpis organizi la ideojn de la estraro, por venigi tiujn ideojn al realo. Ankaŭ dum 2014, mi mem-publikigis laborlibron pri Esperanto, nomata “Beginning Esperanto Workbook,” por kiu Esperanto-USA nun havas la kopirajton. Profesie, mi estas eduka diagnozisto, kiu administras ekzamenojn por malkovri ĉu iuj studento havas lernan handikapon (aŭ aliajn handikapojn). Mia celo profesie estas konvinki al miaj lernejestroj, ke ili permesu min instrui Esperanto-kurson ĉi tie. Mia celo Esperantuje estas helpi la movadon per helpi la aktivulojn realigi siajn ideojn, projektojn, kaj esperojn, inkluzive per helpi la movadon subteni aktivulojn, kiuj havas handikapojn. Pro tio, mi tre valoras mian tempon kiel sekretario, kaj volus daŭri en tiu ofico, ĉar ĝi donas al mi oportunon helpi la komunikadon inter la estraro kaj la membraro.

POR ESTRARANO (elektu du) / FOR BOARD MEMBER (choose two):

Kinen CARVALA <https://youtu.be/A3l4uT88u5Q>

Mi estas Kinen de San-Francisko, Kalifornio. Ekde mia Esperantistiĝo en 2011, mi estas aktiva Esperantisto en la Golfa Regiono. Mi volas iĝi estrarano de Esperanto-USA por helpi subteni lokajn grupojn en Usono. Mi havas estraranan sperton en alia neprofitcela organizaĵo, ĥoro. En mia sperto, efika estrarano devas konsideri, ĉu iu decido bezonas la tempon de ĉiuj estraranoj en ĝenerala kunsido, aŭ ĉu pli malgranda komitata kunsido pli efikus. Se la tuta estraro uzas tro da tempo por komitatindaj diskutoj, la estraro ne havos sufiĉan tempon por aliaj decidendaĵoj. Mi antaŭĝojas kunlabori kun aliaj usonaj samideanoj.



Bradford Carl SMITH

<https://youtu.be/VccCnxu0P8Q>



Mi estas Bradfordo (Bradford Carl Smith), kaj mi kandidatiĝas por la posteno de ĝenerala estrarano dum la balotado de 2025.

Profesie mi estas komputila programisto. Ekde 2020, mi estas unu el la delegitoj de Guglo al Ecma TC39, kiu estas la teknika komitato, kiu regas la programlingvon, JavaScript. En januaro 2024 mi iĝis administranto de mia teamo, kiu prizorgas la programilojn por JavaScript kaj TypeScript ĉe Guglo. Mi menciis tiujn du rolojn, ĉar ili instruis min pri kiel krei reciprokan komprenon inter homoj kun konkurantaj celoj kaj trovi solvojn, kiuj kontentigas al ĉiuj.

Mi eklernis Esperanton la 9-an de aŭgusto, 2022, kaj la ĉarma lingvo tuj kaptis min. Mi notis la eklernan daton, ĉar mi volis taksi, kiom longe mi devos studi por esti kontenta pri mia lingvokapablo. Mi ankoraŭ ne estas tute kontenta, sed mi scipovas Esperanton sufiĉe por plene ĝui NASK 2024. Nun mi volas pli funde kaj pli ofte partopreni Esperantujon kaj kontribui al ĝi. Mi kredas, ke aliĝi al la Esperanto-USA estrarano estus bona maniero fari tion.

Mi estas membro de E-USA kaj UEA (bsmi-x).

Mi estas pasia pri la idealoj de egaleco kaj justeco, kiuj igis D-ron Zamenhof krei Esperanton, do mi ŝategus helpi Esperanto-USA kreski kiel organizo, kuraĝigi novajn esperantistojn kaj kunlabore kun aliaj organizoj fari projektojn, kiuj servas niajn komunajn idealojn.


Aparte interesas min la plibonigo de komunikado kaj agado ene de Esperanto-USA. Mi ŝatus certigi, ke la membroj estas tiel informataj kiel ili ŝatus esti, kaj faciligi al ili trovi manierojn partopreni, kiuj riĉigas iliajn vivojn kaj plibonigas la organizon.

Mi vigle serĉas manierojn pliigi partoprenon en kaj kontribuojn al Esperantujo, kaj tial mi kandidatiĝas al la estrarano. Aparte interesas min la plibonigo de komunikado kaj agado ene de Esperanto-USA. Mi ŝatus certigi, ke la membroj estas tiel informataj kiel ili ŝatus esti, kaj faciligi al ili trovi manierojn partopreni, kiuj riĉigas iliajn vivojn kaj plibonigas la organizon.

Ĉu mi estos elektita aŭ ne, mi antaŭĝojas pliigi mian partoprenon en Esperanto-USA kaj Esperantujo ĝenerale. Mi esperas renkonti multe de membroj de E-USA ĉi-somere dum NASK kaj la Dulanda Kongreso. Mi esperas, ke se vi vidos min tie, vi babilos kun mi.

Zerbie HYNSON

Mi estas esperantisto jam de pli ol dek jaroj kaj aktiva membro de mia loka societo. Mi kandidatiĝas, ĉar mi opinias, ke la bona funkciigado de landaj asocioj estas grava por la glata progreso de nia afero kaj mi volas kontribui al tio.





Mi nomiĝas Izaak (Izako) Zawyrucha-Moore. Mi unue konatiĝis kun Esperanto per mia patro, delonga esperantisto. Bedaŭrinde, li mortis kiam mi estis nur naŭ-jaraĝa, kaj mia patrino ne parolis la lingvon. Mi heredis lian kolekton de esperantaj libroj, kaj kvankam mi infanaĝe ne povis uzi la lingvon hejme, la ideoj kaj la valoro de Esperanto restis kun mi. En 2003, mi reeltrovis Esperanton kaj esperantistiĝis. Kiam mi transloĝiĝis al Suda Kalifornio, mi enprofundiĝis en la komunumo. En 2018, mi transloĝiĝis al Portlando, Oregono, kie mi nun loĝas. Post la pandemio, la loka grupo preskaŭ formortis. Mi ekkomprenis, ke se mi volas revivigi la grupon, mi devas mem ekagi. Tial mi helpis organizi novan renkontiĝon por Paralela Universo 2023, kaj iom post iom, nia malgranda sed entuziasma grupo denove ekfloris. Hodiaŭ, mi engaĝiĝadas pri la kreskigo de la loka Esperanto-movado kaj helpas organizi NOREK-on (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) por 2025.

Esperanto estas pli ol lingvo; ĝi estas parto de mia heredaĵo kaj mia identeco. Mi amas ĝian internaciecon, kaj ankaŭ la realan, homan komunumon kiun ĝi kreas. La revivigo de la loka grupo montris al mi, ke komunumo estas esenca por ke Esperanto vivu kaj kresku. Tamen, lastatempe mi rimarkas kreskantan fendaĵon en la usona kvartalo de Esperantujo. Ekestas malkonkordoj, kaj ofte la pontoj, kiuj devus ligi nin, estas rompiĝantaj. Mi kredas, ke Esperanto devus esti ponto al la mondo, sed antaŭ ol ni povas plene plenumi tiun rolon, ni devas unue ripari niajn proprajn pontojn. Ni devas starigi pli inkluzivan, subtenan kaj kunlaboreman medion por ĉiuj Esperantistoj, ĉu spertaj ĉu novaj, se ni volas, ke Esperanto restu vigla kaj forta. Tial mi kandidatiĝas por la estraro de Esperanto-USA – por helpi fortigi nian komunumon, faciligi kunlaboron inter Esperantistoj, kaj certigi, ke Esperanto plu estu vivanta lingvo en aktiva kaj inspirita komunumo en Usono.

Pli kongrue kun la celoj de Esperanto-USA, mi ankaŭ volas fortigi edukadon. Se mi estos elektita, unu el miaj specifaj celoj estas starigi interretajn Esperanto-kursojn speciale adaptitajn por nordamerikaj lernantoj. Nuntempe, anglalingvanoj en nia regiono devas uzi britbazitajn kursojn dum nekonvenaj horoj. Kreante alireblan lernmedion en la horzonoj, kiuj taŭgas por usonanoj kaj kanadanoj, ni povas forigi gravan baron al aliro kaj kreskado por nia komunumo.

Mi esperas, ke per mia laboro en la estraro de Esperanto-USA, ni povos kune konstrui pli fortan kaj unuiĝintan komunumon, kie ĉiu sentos sin bonvena kaj subtenata. Ni neniam forgesu, ke Esperanto estas pli ol lingvo, sed ankaŭ movado bazita sur kunlaboro kaj respekto, kiu kondukas al pli justa kaj interligita mondo.

PROPONITA ŜANĜO AL LA STATUTO DE ESPERANTO-USA

Proposed Change to the Esperanto-USA Bylaws

PROPONATA ŜANĜO / Proposed Change

Simpligu kaj reduktu la aĝminimumon por estraranoj / Streamline & reduce age requirement for board officers

Motivo: La proponata ŝanĝo havas du celojn. La unua estas havi la saman aĝminimumon por ĉiuj estraraj oficoj. Nun, la Sekretaria ofico havas la saman aĝminimumon kiel ĝenerala estrarano, kvankam Prezidanto, Vic-prezidanto kaj Kasisto havas malsaman aĝminimumon. Tiu ĉi ŝanĝo samigus la aĝminimumon por ĉiuj kvar oficoj.

La dua celo estas redukti la aĝminimumon por la kvar estraraj oficoj de 30 jaroj al 25 jaroj. Ja ekzistas validaj kialoj havi iom pli altan aĝlimon por kandidatiĝi al tiuj ĉi oficoj. Aĝo certe povas esti unu indiko, kvankam ne garantio, ke persono havas pli altan nivelon de matureco kaj respondeco. Tamen, estas aliaj konsiderindaĵoj kiujn la nomuma komitato pripensu. Ni kredas ke la nuna aĝminimumo de 30 jaroj estas tro limiga, kaj povus tro redukti la eblajn kandidatojn por tiuj oficoj, malbonrezulte al la organizo. Aĝminimumo de 25 jaroj ŝajnas trovi bonan ekvilibron certigante iom pli da vivsperto, samtempe permesante pli da kandidatoj konsideriĝi. (Notu kompare, ke la aĝminimumo en la usona Domo de Reprezentantoj estas 25 jaroj).

Motivation: The proposed amendment has two aims. The first is to have a consistent age requirement for the Board officer roles. Currently the role of Secretary has the same age requirement as a Director at-large, while President, Vice-President, and Treasurer all have a different requirement. This amendment would have the same requirement for all four officer positions.

The second aim is to reduce the age requirement for the four officer positions from 30 to 25. There are valid reasons to have a somewhat higher bar for election to these positions. Age can certainly be one indicator, though not guarantee, that a person has a higher level of maturity and responsibility. However, there are other factors which should also be taken into account by the nominations committee. We believe that the current requirement of 30 years of age is overly restrictive, and could be too limiting of the possible candidates for these officers, to the detriment of the organization. A requirement of 25 seems to strike a reasonable balance of ensuring some additional life experience, while allowing more candidates to be considered. (For comparison, 25 is the same age requirement to be elected to the US House of Representatives.)

Notu ke nur la angla versio de nia statuto estas oficiala laŭleĝe. La malformala traduko al Esperanto estas neoficiala.

Nuna Statuto

§401. Ajna membro kiu aĝos almenaŭ 18 jarojn je la ekdato de la ofico rajtas nomumiĝi por estrarano aŭ sekretario.

§402. Ajna membro kiu aĝos almenaŭ 30 jarojn je la ekdato de la ofico rajtas nomumiĝi por Prezidanto, Vic-prezidanto, aŭ Kasisto.

Proponita Statuto

§401. Ajna member kiu aĝos almenaŭ 18 jarojn je la ekdato de la ofico rajtas nomumiĝi por estrarano [Forpreniĝu 'aŭ sekretario']

§402. Ajna membro kiu aĝos almenaŭ 25 jarojn je la ekdato de la ofico rajtas nomumiĝi por Prezidanto, Vic-prezidanto, Sekretario, aŭ Kasisto.

Current Bylaws Language

§401. Any member who will be at least 18 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for Director or Secretary.

§402. Any member who will be at least 30 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for President, Vice President or Treasurer.

Proposed Bylaws Language

§401. Any member who will be at least 18 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for Director. [Remove 'or Secretary']

§402. Any member who will be at least 25 years of age as of the date of the beginning of the term of office may be nominated for President, Vice President, Secretary, or Treasurer.

Esperanto League for North America, dba Esperanto-USA

2025 Papera Balotilo por senretadresaj membroj / 2025 Paper Ballot for those without email addresses

Notu: se vi havas retadreson, vi ricevos ligon al nia interreta balotado; ne uzu tiun ĉi paperan balotilon.

Note: if you have an email address, you will get a link for our online ballot; do not use this paper ballot.

Instrukcioj (English below)

Bonvolu zorge plenumi la jenajn paŝojn:

1. Elŝiru tiun ĉi paĝon de via ekzemplero de *Usona Esperantisto*.
Indiku viajn elektojn en la taŭgaj kvadratetoj sur la dorsflanko.

2. Metu la balotilon en koverteton. Skribu la vorton 'balotilo' sur la koverto sub la resend-adreso.

3. Bonvolu nenion alian enmeti kun la balotilo, kaj nenion alian skribi sur la balotilo aŭ sur la koverto.
Certigu, ke viaj nomo kaj adreso videblas sur la koverto.

4. Enpoŝtigu la balotilon kun aŭfranko por unua klaso.
Balotiloj alvenu ĉe la Centra Oficejo de E-USA ĝis la 1-a de julio 2025. Enpoŝtigu al:

Esperanto-USA
2014 Capitol Ave. #100
Sacramento, CA 95811

5. Se vi akcidente voĉdonas **kaj** per papera balotilo **kaj** per interreta balotilo (Simply Voting), la papera ne validos.

Oni anoncos la rezultojn de la balotado dum la kongreso, kaj aperigos la rezultojn en la retejo de E-USA.

Instructions

Please follow these steps carefully:

1. Tear this page out from your copy of *Usona Esperantisto*.
Indicate your choices by marking the appropriate boxes on the back.

2. Place the ballot in an envelope. Write the word 'balotilo' on the envelope under the return address.

3. Please do not include anything else with the ballot, and do not write anything extraneous on the ballot or envelope. Make sure that your name and address appear on the envelope.

4. Mail it First Class. Ballots must reach the E-USA Central Office by July 1st, 2025. Mail to:

Esperanto-USA
2014 Capitol Ave. #100
Sacramento, CA 95811

5. If you accidentally vote by mail **and** by online voting (Simply Voting), the paper ballot will not be considered valid.

The results of the election will be announced during the congress and will appear in the E-USA website.

Esperanto League for North America, dba Esperanto-USA

2025 Papera Balotilo por senretadresaj membroj
2025 Paper Ballot for those without email addresses

Notu: se vi havas retadreson, vi ricevos ligon al nia interreta balotado; ne uzu tiun ĉi paperan balotilon.
Note: if you have an email address, you will get a link for our online ballot; do not use this paper ballot.

Por Sekretario / For Secretary
Elektu maksimume UNU / Choose only ONE

☐ Charlotte BURTON

Por Estrarano / For Board Member
Elektu maksimume DU / Choose only TWO

☐ Kinen CARVALA

☐ Bradford Carl SMITH

☐ Zerbie HYNSON

☐ Izaak Zawyrucha-Moore

Proponata Statutŝanĝo
Proposed Bylaws Change

☐ Yes ☐ No

Aŭtoroj (en ordo de apero)

Brandon SOWERS

Brandon SOWERS estas la prezidanto de la estraro de Esperanto-USA. Li esperantistiĝis en 2003 kaj aktivis en pluraj urboj kaj landoj. Li estas parto de la teamo de Usono Persone.

<brandon.sowers@esperanto-usa.org>



Matt BROOKS

Mateo BROOKS ekstudis Esperanton en 2017 kaj pasie verkas poezion, kiun li lastatempe adaptas al kantoj per artefaritaj intelektoj kiel Suno. Li parolas kvar lingvojn kaj studas multajn aliajn per platformoj kiel Duolingo. Kun pli ol dek jaroj da sperto en estraroj de neprofitcelaj organizaĵoj kaj pli ol dudek jaroj en financaj kaj teknologiaj postenoj ĉe grandaj firmaoj, li kontribuas kiel Kasisto de E-USA per vasta scio kaj sperto. Liaj literaturaj verkoj haveblas ĉe *blog.brooksny.net*.

<matt.brooks@esperanto-usa.org>



Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.

<tboronczyk@gmail.com>



Jurij ŜĈERBAK

Jurij ŜĈERBAK (n. 1934, Kijivo) estas ukraina scienculo-epidemiologo (eliminis epidemion de ĥolero en Uzbekujo kaj Ukrainujo), politikisto (1990 — fondinto kaj la unua prezidanto de Verdula Partio de Ukrainujo), diplomato (ambasadoro de Ukrainujo en Israelo, Usono/Meksiko, Kanado) kaj verkisto (novelo *Ĉornobilo*, 1987, aperis esperante en moskva eldonejo Progreso, 1990).



Viktor PAJUK

Viktoro estas esperantisto de 1979, kunfondinto de UkrEA (1989), ĝia prezidanto (1993–1997), prezidanto de E-societo de Ŝikago, kaj redaktoro de ĝia bulteno *Saluton!* (2004–2019, pli ol 180 ĉiumonataj n-roj). Li ukrainigas originalan E-literaturon, kaj esperantigas ukrainajn aŭtorojn.



Xavier ALCALDE

Xavier ALCALDE estas politologo kaj esploristo pri paco, kiu loĝas en Barcelono, Hispanujo. Li multe interesiĝas pri lingva justeco kaj membras en la Akademio de Esperanto.


<alcalde.javier@gmail.com>



Lua HALL

Lua konsistigas duonon de la redakcio de *Usona Esperantisto* ekde 2024. De 2020 ŝi estas administranto de la plej granda esperanta komunumo ĉe *Discord*. Profesie ŝi laboras kiel analizisto pri ciberminacoj.

<lua.hall@esperanto-usa.org>



Wale OGUNYALE


Wale estas teksisto kaj post-diploma studento pri Lingvistiko ĉe la Universitato de Uyo, Niĝerio. Li studas interalie lingvan instruadon, indiĝenajn komunikistemojn, interretan lingvistikon, kaj tradukadon. Krom la nun-prilaborata vortareto pri *aṣọ òkè* (jorubaj teksaĵoj), li kreis bild-aŭdan vortaron pri *Ọrọ*, lingvo parolata en la ŝtato *Akwa Ibom*, en Niĝerio.



Chelsea MOSES

Post sukcesa aktora kariero, Chelsea koncentriĝas pri lingvoj, vojaĝo, kaj Esperanto. Nuntempe loĝanta en Sudameriko, ŝi instruas la anglan kaj administras esperantan Jutubkanalon. Chelsea trovis Esperanton en 2020, kaj de tiam kontribuas al la Esperanto-komunumo per aŭdvida materialo, kiu fokusiĝas al igi Esperanton alirebla en la ĉiutaga vivo.


<alena.adler@esperanto-usa.org>



Alena ADLER

Alena konsistigas duonon de la redakcio de *Usona Esperantisto*. Ŝi estas kaj tradukisto kaj tujelsendisto en Esperanto kaj la angla, interalie pri muziko kaj videoludoj.

<alena.adler@esperanto-usa.org>



Ankaŭ kontribuis **Simono KEITH**.

